

1974 junio

67-a jaro

n-ro 822 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



CCH:
La ideala kongresejo

Vi trovos

ke ĉi tiu numero denove regajnis la variecon de la temoj, pri kio la redakcio daŭre zorgas. Sur pluraj paĝoj de la numero, kiun vi tenas antaŭ vi, ni traktas temojn, kiuj unuavide estas ekstermovadaj, sed kiuj tamen havas fortajn rilatojn kun la strebado kaj la principaro de la Esperanto-movado (v. la paĝojn 103-104 kaj 106-107). Sur la paĝo 105 vi trovos raporton pri la ĉi-jaraj subvencioj de Institucio Hodler 68, kiu de jaro al jaro transformiĝas en ĉiam pli efikan fonton de financaj rimedoj por la Movado. La ĉi-foja rubriko de CED (p. 108-109) resumas la nunan staton de la ĉiam pli akuta lingva demando en la hodiaŭa mondo. La rubriko "Enciklopedio", kiu de tempo al tempo gastas sur niaj paĝoj, ĉi tiun fojon portretas la estonan poeton Hendrik Adamson. Kiel kutime, la paĝoj de Loke — Fake — Persone alportas manplenon da mallongaj interesaj novaĵoj el la tuta mondo.

Enhavo

- 101 Kien direkti la agadon: La 50-procenta regulo (W. Bormann)
- 102 Reagoj al la aprila ĉefartikolo: Neaperigo, — kial? (sm), Helpu nin helpi ilin: Pli ol unu helpmaniero
- 103 La amasa komunikado: Televida trafiko — unudirekta strato
- 104 Lingva nekompetento, Vigla eldonado en Brazilo, Bengalaj en Bihar
- 105 Institucio Hodler 68: Valora financa apogo, Korektoj
- 106 Internacia lingvo por la silenta mondo: Internacia vortaro de gestoj (Y.U.)
- 108 Informoj de CED: Akriĝo de la lingva demando, Pri "Esperanto en Perspektivo", Donacoj por CED en 1974
- 110 Enciklopedio: Hendrik Adamson (Jaan Ojalo)
- 111 Recenzoj (Komputil-teknika vortaro, "Esploroj", "Kvindek jaroj de Esperanto en Oomoto", "Finalo '73", "La lanternisto kaj aliaj prozaĵoj"), Laste aperis ...
- 114 TEJO-paĝo: La lasta alvoko por la IJK, Nova subvencio al TEJO
- 115 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 59a UK en Hamburgo
- 116 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 118 Oficiala informilo, Nekrologoj (L. Dér, C. Domingues, E. Gasse, E. Harangozo, W. Juskiewicz, K.A. Lavrentjev, E. Natalis, E. Tudela Flores)
- 119 Esperanto en radio
- 120 Anoncetoj

La kovrilo

CCH aŭ KCH estas mallongigoj por la nomo de la Kongres-Centro Hamburgo, kiu post iom pli ol unu monato gastigos la 59an Universalan Kongreson en la nordgermana metropolo. La ĉi-jara kongresejo sendube estas unu el la plej taŭgaj en la historio de la Universalaj Kongresoj, ĝi simple estas — la ideala kongresejo. En la momento de la finredakto de ĉi tiu numero de la revuo, KCH jam logis preskaŭ 1 500 gekongresanojn el rekorda nombro de ĉ. 50 landoj. Oni ankoraŭ akceptas aliĝojn.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: S. Milojević.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, FR Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, FR Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

La 50-procenta regulo

ĈIAM PLI OFTE ankaŭ la funkciuloj de la Esperanto-movado konsciiĝas pri la fakto, ke ekzistas homoj, kiuj la Internacian Lingvon lernis sen la idealisma emo siaflanke plivastigi la popularecon de la lingvo. Kvan-kam kelkaj konservativuloj ankoraŭ preferas fermi la okulojn antaŭ tiu fenomeno, ĝia serioza priksidero en la cirkonstancoj de nia laboro devas influi ankaŭ niajn planojn. Se ekzistas homgrupoj lernintaj la Internacian Lingvon pro malsamaj motivoj, tiam ne konvenas daŭre resti kroĉita al la malnova koncepto pri la demando — kio estas “esperantisto”. Male, nia progreso estas plifaciligita, se ni turnas nin, kun diferencaj deziroj, al la du grupoj de la lernintoj de Esperanto. Prave ankaŭ la nova Laborplano de UEA, akceptita de la Komitato en Beograd en 1973, faras distingon inter la *agantoj* kaj *uzantoj*.

Dum la uzantoj nur iel apogas la laborojn por Esperanto, estas la agantoj tiuj, kiuj vere antaŭenigas la Internacian Lingvon, plenumante ĉiujn necesajn laborojn. Unuflanke, tio estas laboro en la Movado mem, ekz. kunordigi laborfortojn, instigi, averti, kuraĝigi, konsili, helpi ktp. Sed tio estas kaj restas laboroj interne de la Movado. Estas tute kompreneble, ke niaj klopodoj ne povas direkti sin nur al la esperantistoj. Ni devas zorgi ankaŭ pri la dua flanko: la tuto de niaj agadoj devas konsisti el internaj taskoj kaj el laboroj direktitaj al la ekstermovada publiko. Konvinki neesperantistojn signifas aldoni novajn fortojn al niaj vicoj. El tio sekvas, ke post la disdivido de la esperantistoj en du grupojn, an-

kaŭ en la grupo de la *agantoj* necesas formi du subgrupojn: la internan kaj la eksteran.

Por ĉiu aktivulo en la nacilingva medio la diferencigo inter la du formoj de laborado estas tre facile farebla: Rilatoj interne de la Movado kompreneble okazas en la Internacia Lingvo, dum la klopodoj influi la ekstermovadan publikon kaj favorigi ĝin al Esperanto evidente devas okazi en la nacia lingvo. La vera aganto do devas aktivi en ambaŭ kampoj, aplikante ne nur la Internacian, sed ankaŭ sian nacian lingvon. Estas erare en sia aktiveco uzi nur Esperanton, ĉar tio signifas resti inter la lingvoamikoj, kie ĉiu jam estas konvinkita

Estas facile kontroli la plenumon de tiu postulo. Necesas nur rigardi en la personan, kluban aŭ asocian arĥivon kaj eltrovi respondojn al jenaj demandoj: Ĉu inter la korespondaĵoj troviĝas sufiĉe da leteroj ankaŭ en la nacia lingvo? Ĉu inter la faritaj prelegoj troveblas almenaŭ kelkaj en la nacia lingvo aŭ temis nur pri klubvesperaj paroladoj? Ĉu la publikigitaj artikoloj, broŝuroj kaj eventuale eĉ libroj estas nur esperantlingvaj aŭ ankaŭ en la nacia lingvo? Ĉu oni pri sia aktiveco informadis nur la Esperantan gazetaron aŭ oni pri siaj entreprenoj sciigis ankaŭ la nacilingvaj gazetaroj, radion kaj televidon? Ĉi tiuj demandoj estas nepraj por ĉiu aktivulo, klubo aŭ asocio, kaj nur se montriĝos, ke oni agas en ambaŭ lingvaj medioj — la internacia kaj la nacia — oni povas esti kontenta pri la laboro. Ne eblas definitive rilatigi la ampleksojn de la laboroj en tiuj du branĉoj de la aktivado, sed ĉar temas pri du laborkampoj, altrudas sin egala disdivido: 50% ĉe la laboroj okazu en la Internacia Lingvo, kaj 50% en la nacia lingvo, sed por Esperanto. Mi ŝatus nomi tion *la 50-procenta regulo*. Aktivulo estu kontenta nur se li aŭ ŝi same intense laboras kaj verkas ankaŭ en sia nacia lingvo kiel li aŭ ŝi tiurilate agas en Esperanto. Estas ja sole la nacia lingvo tiu, kiu al la vasta publiko povas transporti la belajn ideojn pri la utilo kaj neceso de Esperanto. Tial argumentadi nacilingve signifas vere antaŭenpuŝi la Internacian Lingvon kaj kunhelpi pri ĝia fina sukceso. Nepre necesas eliri el la ŝatata rondo de la esperantistoj kaj meti sin en la ŝtormojn de la batalkampoj por Esperanto, meze inter la nekredantojn, dubemulojn kaj atakantojn. Tie, sur tiu ekstermovada batalkampoj, falos la definitiva decido pri la Internacia Lingvo — jes aŭ ne. Pro tio, sole kiam ni en nia agado aplikos la 50-procentan regulon, nur tiam ni rajtos fieri pri niaj faritaĵoj.

D-ro Werner Bormann,
estranano de UEA
pri organiza plifortigo

La eldona aktiveco en la nacia lingvo, kiun dum la lastaj jaroj praktikas Hungara Esperanto-Asocio, povas liveri pruvojn, ke la ideoj, kiujn ĉi tie traktas d-ro Bormann, jam donis bonegajn rezultojn en la praktiko.

ESPERANTO

magazin

NYELV ÉS VILÁG

A TARTALOMBÓL:

Kalocsay Kálmán,
Karinthy Frigyes,
Lev Uspenszkij,
Dr. Szerdahelyi
István,
G. Waringhien
írásai

Tudósok
tanúságtétele
Hírek száz lapból
Ablak a világra
Nyelvi problémák
Belgiumban
A nyelvészek
és az esperantó
Nyelvtanfolyam

1974.
január
XIV. évf. I. szám

Ára: 3 Ft



Neaperigo, — kial?

EN LA MAJA NUMERO de nia revuo (p. 82) aperis dankesprimoj de la prezidanto de UEA pro la esprimoj de solidareco kaj persona simpatio, okaze de lia ĉefartikolo en la aprila numero de *Esperanto* (p. 61-65). Temis pri la reagoj, kiuj venis rekte al la adreso de la prezidanto kaj ne al la adreso de la redakcio.

Ĝis la momento kiam la junia numero de la revuo estas finredaktata, la redakcian adreson atingis entute 28 reagoj al la aprila ĉefartikolo, parte aprobaj, parte malaprobaj.

Preskaŭ ĉiuj reagintoj petis aŭ postulis aperigon de sia reago, kaj nur kelkaj sendis sian opinion kun indiko "porinforme al la redakcio". Almenaŭ duono el la reagoj estas ampleksaj plurpaĝaj artikoloj. Krome, la redakcion atingis ankaŭ kelkaj cirkuleroj, kiuj rekte aŭ nerekte ligiĝas al la aprila ĉefartikolo. En tia situacio, la redakcio opiniis, ke plej oportune estas, almenaŭ en la nuna momento, rezigni pri la publikigo de la reagoj. Kun la celo informi ankaŭ la legantojn de la

revuo pri la kialoj, kiuj instigis la redakcion al tia paŝo, ni ĉi tie resumas kelkajn el tiuj kialoj:

1. Jam la nombro de la reagintoj fizike malebligas la publikigon, ĉar ĝi postulus plurajn revu-numerojn, des pli, se oni observus la deziron de pluraj aŭtoroj — aperigi iliajn kontribuojn sen ajnaj ŝanĝoj.

2. Pluraj el la reagoj estas tro afekcie verkitaj rilate la personecon de prof. Lapenna kaj ofte eĉ ne traktas aferojn, kiujn tuŝis la aprila ĉefartikolo. Kelkaj aliaj reagoj transpaŝas la limojn de akademia nivela polemiko kaj uzas ĵurnalisme neakcepteblajn kvalifikojn kaj esprimojn.

3. Sub la ŝarĝo de diversfontaj emocioj, kelkaj el la reagoj danĝere manipulas per politikaj etiketoj kaj nete negative stampas difinitajn politikajn sistemojn. Ilia aperigo signifus rompon de la politika neŭtraleco de UEA kaj ĝia organo.

4. Nepovante publikigi ĉiujn reagojn, la redakcio rezignas pri ilia parta aŭ resuma diskonigo, ĉar tiurilate estus malfacile konservi senpartiecajn kriteriojn, eĉ almenaŭ tiagrade kiom tio dependas de la redakcio. Aliflanke, aperigo de nur unu parto de la reagoj signifus miksiĝon en la procezon de la nun okazantaj kaj en Hamburgo okazontaj elektoj por la gvidorganoj de la Asocio, kion la redakcio volonte evitas.

5. Pluraj temoj, kiujn tuŝas ne nur la ricevataj reagoj, sed plurloke ankaŭ la aprila ĉefartikolo, — laŭ nia opinio — devus esti traktitaj unue en la Komitato de UEA, kaj nur poste kaj eventuale sur la paĝoj de nia revuo.

Simo Milojević

HELPU NIN HELPI ILIN:

Pli ol unu helpmaniero

INSTIGITA de la ĉefartikolo en la pasintjara julia/aŭgusta numero de nia revuo ("Helpu nin helpi ilin"), kiu traktis problemojn de efika kaj daŭra helpo al komencantoj kaj interesitoj pri Esperanto en la landoj kiuj ne havas organizitan Movadon, s-ro Robert Kvašňák el FR Germanio skribis al ni leteron, kiu aperis en la novembra numero de la revuo (p. 187). Tiu letero donis novan dimension al la senĉesaj klopodoj de la Centra Oficejo kontentigi la helpopetojn, kiuj daŭre kaj grandnombre venas al la adreso de UEA. En la sama numero de la revuo (novembro 1973) ni aperigis la unuan liston de 9 petintoj, kun celo peri rektajn kontaktojn inter personoj petintaj helpon kaj personoj, kiuj pretas doni helpon. Ĉar tiu alvoko havis tre bonan eĥon, ni ĉi tie aperigas naŭ novajn

nomojn de personoj, kiuj volas lerni la Internacian Lingvon, sed ne havas eblecojn akiri lernomaterialon, aŭ jam komencis la lernadon, sed ne povas daŭrigi sen helpo. En parentezoj post la nomoj estas indikita la lingvo pere de kiu oni povas lerni.

10. Katherine Blell, Gambio. (angla)
11. Samba Faal, Gambio. (angla)
12. L.F. Martínez Solís, Kolombio. (Esp.; hispana)
13. Kim. N. Hoang, Vjetnamio (Ŝuda). (angla)
14. Alejandro Ochoa Toro, Kolombio. (hispana)
15. Rodrigo Osorio Mejia, Kolombio. (hispana)
16. Jaime Arias Vargas, Kolombio. (hispana)
17. Rodrigo Bernal G., Kolombio. (hispana; Esp.)
18. Jacob K. Jagne, Gambio. (angla)

Se vi pretas helpi, bonvolu peti la adreson ĉe la Centra Oficejo de UEA, indikante la numeron post kiu ĉi tie aperas la nomo de la persono, kiun vi elektis. Ankaŭ la aliaj manieroj por helpi, kiujn menciis la artikolo en la pasintjara julia/aŭgusta numero de nia revuo, restas aktualaj. Tiucele vi povas donaci monon al la Propaganda Konto de UEA aŭ al la adreso de la Centra Oficejo sendi nebezonaĵajn lernolibrojn kaj vortarojn, kiujn ni plusendos al la helpopetintoj en Azio, Afriko kaj Sudameriko.

Televida trafiko – unudirekta strato

DU FINNAJ FAKULOJ, Kaarle Nordenstreng kaj Tapio Varis, antaŭ du monatoj publikigis ĉe Unesko raporton pri la nuna situacio sur la merkato de la televidaj programoj. Laŭ tiu raporto, la usona eksporto de la televidaj programoj, ampleksanta cent ĝis ducent mil programhorojn jare, spertas malkreskajn tendencojn kompare kun la brita, franca kaj germana eksportado samkampa. Kelkaj aliaj ekspertoj pri la amasa komunikado opinias, ke la usona eksporto de televidaj programoj fakte ne malkreskas, sed ĝia kreskoritmo ne plu estas tiel okulfrapa kiel antaŭe. Ĉiukaze, Usono kaj Ĉinio estas, laŭ la menciita raporto, la plej sendependaj landoj rilate siajn televidajn elsendojn, ĉar iliaj televidaj programoj apenaŭ enhavas importitajn programerojn. Simila situacio estas ankaŭ kun Japanio kaj Sovet-Unio.

Aliflanke, plejmulto da landoj grave dependas de la importitaj televidaj programoj. Eĉ la alte evoluintaj industriaj landoj de Eŭropo importas ĉ. 30 procentojn de siaj televidaj programoj, dum, kiam temas pri la landoj de la Orienta Eŭropo, la importo atingas 23 procentojn.

Tamen, tiuj procentoj multe varias de lando al lando. En Eŭropo, Islando, Bulgario, Finnlando kaj Hungario estas la plej grandaj konsumantoj de importitaj televidaj programoj. Simila situacio estas ankaŭ en aliaj partoj de la mondo: En Azio, kun escepto de Japanio kaj Ĉinio, ĉiuj aliaj landoj importas 50 ĝis 75 procentojn da televidaj programoj. En Afriko ne estas pli bona stato tiurilate: Niĝerio importas du trionojn, Ganao kvaronon, sed Ugando nur kvinonon da programo por siaj respektivaj televidaj elsendoj.

Almenaŭ kiel ŝajnas el resumo de la raporto de la du finnaj fakuloj, produktita de Unesko kaj destinita al la gazetaro, la televida trafiko, la interŝanĝado de



Televida studio en Abiĝano (Ebura Bordo): Kun la nuna kvanto de importitaj programoj, la diletanteco povas daŭri preskaŭ eterne.

televidaj programoj, okazas nur unudirekte: kelkaj riĉaj landoj provizas la mondon per televida menuo laŭ sia propra recepto, kompreneble ankaŭ en sia propra nacia lingvo. Oni ne mencias kazojn laŭ kiuj Usono, Britio, Francio aŭ FR Germanio importadus programojn el la landoj, kiujn ili nutras per plurhora mensaturilo ĉiutage. Francio ekzemple, kaj por konservativa kapo ankaŭ tute kompreneble, ne importas televidajn programojn el Afriko, kvankam tien iras minimume 12 000 televidaj programhoroj ĉiutage. Plej ofte la afrika eksporto de la francaj televidaj programoj okazas en la kadro de t.n. “kultura distribuo”, kiun fincas la franca registaro kaj kiu senpente povus nomiĝi ankaŭ kultura koloniismo. Aliflanke, du trionoj de la programo, kiun eksportas Britio, estas humuraj serioj kaj komedioj, dum la restinta triono koncernas edukajn, artajn kaj aliajn temojn. Laŭ la resumo de Unesko, la raporto mencias jenajn tri kaŭzojn de la unudirekta televida trafiko: 1) la novkreitaj televidaj centroj en la malriĉaj landoj, pro la manko de teknikaj rimedoj kaj trejnitaj fakuloj, dependas de kelkaj industriaj landoj; 2) multaj landoj estas kaj tro malriĉaj kaj tro maldense loĝataj por permesi al si memstaran produktadon de la televida programo; 3) la situacio estas tia, ke plej ofte estas

pli ekonomie aĉeti fremdan, ol produkti propran televidan programon.

Oni ricevas impreson, ke la lingva problemo ludas nenian rolon en la unudirekteco de la televida trafiko, ĉar la raporto tute ne mencias ĝin. Oni almenaŭ povis mencii la unuecigan rolon, kiun la eksportado de la programoj ludas rilate la grandajn naciajn lingvojn, kiuj plej ofte iam estis la lingvoj de la kolonia regado, kaj nun havas pretendojn sur la kampo de la internacia komunikado. Estas triste, ke la publikaĵo de la monda organizaĵo por edukado, kulturo kaj scienco eĉ ne tuŝas la plej gravan aspekton de la eksportado de televidaj programoj en la maniero laŭ kiu ĝi nun okazas. Ĉu Unesko ne vidas aŭ pli probable ne volas vidi, ke

tia amasa eksporto, des pli kiam ĝi estas senpaga, estas tute kontraŭa al la celoj de Unesko mem? Pro la neglekto de la lingva kaj sekve ankaŭ de la kultura egalrajteco, la unudirekta televida trafiko estas nenio alia krom praktikado de la lingva kaj kultura koloniismo. Tia eksportado kaj trudado de la propraj lingvo kaj kulturaj valoroj ne estas helpo al la malriĉaj landoj, sed ĝi estas neta malhelpo; tio ne estas apliko, sed serioza tordo de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj. Fine, ne temas esence pri la unudirekta televida trafiko, sed, almenaŭ en ĉi tiu kazo, pri unudirekta penskaj ag-maniero de internacia organizaĵo, kies tasko estus kontraŭbatali la lingvan kaj kulturan imperiismon, kiu regas en la kampo de la amasa komunikado. sm

Lingva nekompetento

EN RAPORTO, speciale preparita por la Usona Parlamento, oni substrekas la mankon de lingve kompetenta personaro en la usonaj registaraj oficejoj en eksterlando. La raporto pledas por plibonigoj en la lingvoinstruado al la registaraj oficistoj, kiuj postenas en eksterlando kaj por atento al la lingvoscio kiam oni

nomas tiajn oficistojn. Pluraj faktoj, per kiuj la raporto argumentas sian pledon, kaptas la intereson:

Nur 59% de la postenoj, kiuj postulas bonan konon de la loka nacia lingvo, en la usonaj diplomatiaj reprezentantoj en Eŭropo, estas okupitaj de kompetentaj personoj. Por la Proksima Oriento kaj la Suda Azio tiurilate oni mencias 45%, dum en la Malproksima Oriento, el 127 postenoj, ĉe kiuj la lingvokono estas esenca kvalifiko, nur 53 estas okupitaj de kompetentuloj. La raporto emfazas, ke ankaŭ en aliaj, ne-registaraj usonaj reprezentantoj en eksterlando regas simila situacio.

Vigla eldonado en Brazilo

BRAZILA SPIRITISTA FEDERACIO estas la ĉefa organizaĵo de tiu religia movado, kiu estas ekstreme populara en Brazilo. Ĝiaj ligoj kun la Internacia Lingvo estas jam tradiciaj kaj fortaj, simile al la ligoj inter Oomoto kaj Esperanto en Japanio. Same kiel Oomoto, ankaŭ la Federacio en sia teritorio ludas gravan kulturan rolon, kiu ĉefe manifestiĝas en la eldona aktiveco. Laŭ informoj ricevita de nia kunlaboranto D. Pereira de Souza, Brazila Spiritista Federacio ankaŭ en ĉi tiu jaro havas ambiciajn eldonplanojn en la Internacia Lingvo. Jam komence de la jaro aperis la ampleksa biografia verko *Iŝmael Gomes Braga*, en kiu Zeus Wantuil skizis la vivon kaj verkon de la konata brazila veterano, kaj *Mediuma poemaro* de L.C. Porto Carreiro Neto, — ambaŭ bone akceptitaj de la kritiko kaj publiko. Intertempe verŝajne jam aperis ankaŭ *Sur la vojo al lumo* de Emanuel kaj *Reenkarniĝinta lupo* de Roque Jacinto, ambaŭ tradukitaj de A.K. Afonso Costa. Krom du pliaj spiritismaj verkoj, kies eldono estas promesata ĉi-jare, oni faras lastajn preparojn por ĝis la fino de la jaro eldoni ankaŭ poemaron de Robin-dronath Thakur, la fama bengala poeto kaj filozofo, en traduko de prof. Benedicto Silva. La Federacio ankaŭ ĝis nun apartenis al la plej aktivaj eldonantoj en la Internacia Lingvo en Sudameriko, kvankam ĝiaj

eldonaĵoj ne aperadis en la ĉi-jara eldonritmo, kiun ebligis, interalie, la instalo de tute nova, moderna ofseta presejo.

Bengaloj en Bihar

Mazaffarpur (Bihar, Orienta Hindunio) gastigis lastatempe la 16an sesion de la Asocio de Bengaloj en Bihar prezidatan de la renoma aŭtoro Bibhuti-Bhushan Mukhopadhyay. La ĉefgasta parolado de Niti-shwar-Prasad Sinha, la ŝtata edukministro, emfaxis la rolon de la Asocio akceli kaj faciligi informan kaj kulturan kunlaboron inter Bengalujo Okcidenta kaj Bihar, kiu jam agnoskas la bengalan kiel minoritatan lingvon. Atenta pri la endo ne diskrimini la bengalan sur ajna nivelo de la bihara eduksistemo, s-ro Sinha rekomendis akcenti la postulon instrui gepatralingve kelkajn studobjektojn. La sesio aŭskultis eminentulajn paroladojn en diversaj lingvoj, la bengala, hindia, mitila (Maithili), urdua kaj saontala (Santali/Santhali). La 17a sesio okazos venontjare en Patna.

Valora financa apogo

INSTITUCIO HODLER 68, fondita antaŭ ses jaroj por administri la Kapitalon Hodler 68, de jaro al jaro donas ĉiam pli efikan financan apogon al la Movado. Kvankam siatempe fondita kun eksplicita celo plifortigi la financan bazon de UEA, la Institucio dum la lastaj jaroj komencis donadi sian apogon ankaŭ al organizaĵoj kaj entreprenoj ekster la kadro de la Asocio, kio provokis kritikajn reagojn, ekz. pasintjare, en la Estraro de UEA. Supozeble, la ĉi-jaraj subvencioj de la Institucio provokos malpli da kritiko.

La plej granda apogo de Institucio Hodler '68 iras ankaŭ ĉi-jare al Fondaĵo Canuto. Pere de tiu Fondaĵo ankaŭ s-ro Ngingi Malonga Matuba estas jam 9 jarojn membro de UEA kaj funkcias kiel fakdelegito en la ĉefurbo de Zairo.



Ĉar dum la pasinta jaro la Kapitalo Hodler 68 kreskis kompare kun 1972 je ĉ. 8 000,— guldenoj, ankaŭ la gajno destinita por la ĉi-jaraj subvencioj estis pli granda: 6 500,— guldenoj (kompare kun 5 800,— guldenoj dividitaj en 1973). Sed, kreskis ankaŭ la sumoj, kiujn oni subvencie petis de la Institucio (entute 15 150,— guldenoj), kaj la Estraro frontis malfacilan taskon traktante la disdividon de la gajno.

En sia kunsido de la 27a de aprilo 1974, la Estraro de Institucio Hodler 68 (s-ro G. Maertens, d-ro W. Bormann kaj s-ro E. HaverSchmidt, konstatinte, ke ne estas eble pozitive reagi al ĉiuj petskriboj, decidis dividi la subvenciotajn petskribojn en du grupojn kaj asigni al ili jenajn monsumojn:

La unuan grupon konsistigas tiuj, al kiuj oni asignis pli grandajn subvenciojn: Fondaĵo Canuto: 2 000,— guldenoj, por 50 membro-abonantoj de UEA el aziaj kaj afrikaj landoj; Centro de Esploro kaj Dokumentado: 1 000,— guldenoj, "por iom helpi al la ampleksa laboro konstante farata per tro modestaj rimedoj"; Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj: 1 000,— guldenoj, "por restarigo de regula eldonado de *Internacia Pedagogia Revuo* kaj por reakiro de la abonantaro"; Ĝenerala kaso de UEA: 1 000,— guldenoj, eksplicite por riparo kaj farbado de la fasado de la domo de UEA.

En la dua grupo de la subvencioj troviĝas tiuj, kiujn la Institucio apogas per egalaj sumoj de po 375,— guldenoj: la porinfana revuo *Juna Amiko*, eldonata

en Hungarujo (v. *Esperanto*, majo 1974, p. 90); Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto, kiun sub la aŭspicioj de CED ĉefredaktas U. Lins; Eŭropa Esperanto-Centro, pri kies aktiveco ni raportis en la maja numero de nia revuo (p. 84); Societo por Internacia Lingvo, por daŭrigi la presforman eldonadon de *Interlingvistika Informa Servo*.

La administranto de la Institucio, f-ino M.H. Vermaas (Nieuwe Binnenweg 70/II R, Rotterdam-3002, Nederlando), informas, ke en decembro 1973 venis plia granda donaco (pluraj miloj da guldenoj), kiu tamen eniros la Kapitalon nur en ĉi tiu jaro. Krome, estas notinde, ke proksimume unu triono de la Kapitalo estas donacoj, kaj alia triono estas senrentaj pruntoj. Institucio Hodler 68 ankoraŭ akceptas donacojn kaj pruntojn; informojn bv. peti ĉe la administranto.

Korektoj:

H. A. de Hoog


S-ro de Hoog amike atentigis min, ke li neniam uzis la vortojn, kiujn mi atribuis al li en mia artikolo "UEA en danĝero de malintegriĝo" (*Esperanto*, aprilo 1974, p. 63), sed ke ili verŝajne estis uzitaj de iu alia kiel resuma impresio pri lia recenzo en *Dia Regno* rilate la eldonon de Ebbe Vilborg *La Participa Problemo en la Akademio*. Li efektive pravas: kiel tiaj, la koncernaj vortoj estas uzitaj de s-ro de Diego en la hispana *Boletín*, en komento pri la recenzo de s-ro de Hoog. Mi bedaŭras tiun hazardan mikson de la du nomoj, kiu tamen neniel ŝanĝas la ĝustecon de la diro, kaj pardonpetas al ambaŭ.

Ivo Lapenna

V. Setälä

Dum la enpaĝigaj laboroj por la maja numero de nia revuo, el la recenza teksto de s-ro Vilho Setälä pri *Amuzaj dialogoj en Esperanto*, aperinta sub la titolo "Kritikinda principaro" (p.92), forfalis du finaj linioj de la punkto 6. La lasta frazo en tiu punkto devus teksti jene: "Aliparte, se vi konas iom la psikologion de la lingvo, 'verŝajna' signifas proksimume samon kiel 'atendebla', dum per la skribita formo 'ver-ŝajna' kaj la ĝusta prononco de tio, kun iom da akcento sur 'ver' oni donas la impreson de io, kion oni prezentas kiel veran, sed kio nur ŝajnas vera". Ni pardonpetas pro la eraro.



La redaktoro



Internacia vortaro de gestoj

“AŬDKAPABLAJ HOMOJ uzas gestojn nur por emfazi parolan lingvon kaj komuniki nuancojn kaj fortecon de la signifoj esprimataj pere de la tonoj kaj modulado de sia voĉo. Sed la surdmutuloj esprimas tiujn sentojn kaj nuancojn pere de adekvataj vizaĝesprimoj kaj modulado de gestoj.” Tiel resumas la gravecon de la gesta lingvo, praktikata inter la surdmutuloj kiel internacia komuna lingvo, Cesare Margarotto, la ĝenerala sekretario de la Monda Federacio de la Surdmutuloj, en artikolo aperinta en la marta numero de *Unesco Courier*. Cetere, tiu numero de la revuo estas komplete dediĉita al prilumo de diversaj aspektoj de la vivo de handikapitaj homoj. Nian intereson, inter alie, kaptis la fakto, ke oni klopodas normigi la gestan lingvon tiel, ke ĝi estu egale uzebla kiel komuna inter-

La gestoj, same kiel la unua pervaĉa esprimo de la homo, kondukas nin reen al la antaŭhistoriaj tempoj, kiam ili formis validan sistemon de komunikado, facile kompreneblan de malsamaj gentoj, ĉar la gestoj ĉiam rilatis al konkretaj aferoj. La komunan originon de la “naturaj gestoj” hodiaŭ pravas ankaŭ la fakto, ke ekz. surdmutaj eŭropanoj povas sukcese uzi siajn kutimajn komunikgestojn por interkompreni kun amerikaj indiĝenoj aŭ tribanoj el Afriko kaj Sudameriko, ĉar temas pri preskaŭ identaj gestosignifoj. Al la “naturaj gestoj” jarcentoj da praktikado aldonis plian kolekton da ŝablonaj movoj, per kiuj diversnaciaj surdmutuloj povas senĝene “konversacii” dum horoj. komprenilo en diversspecaj internaciaj konferencoj kaj renkontiĝoj de surdmutuloj.





okaze de la 7a Mondkongreso de Surdmutuloj en Usono, aperos unuvoluma vortaro kun pli ol 1 500 gesto-fotoj.





Konsciante pri la seriozeco de la monda lingva problemo kaj malfacileco en la klopodoj "atingi interkomprenigon de homoj parolantaj malsamajn lingvojn", la Monda Federacio de la Surdmutuloj jam depost 1951 kompilas vortaron de gestoj, kun celo normigi la tutmondan uzon de la "silenta lingvo". Dek jarojn pli poste, en 1961, aperis la unua volumo de la vortaro, konsistanta el 339 fotoj de gestoj, kiujn akompanis angla kaj franca glosaroj. La dua volumo sekvis post pliaj dek jaroj da streĉa laboro kaj en 1971 alportis 300 pliajn fotojn de "vortoj". En la sekvonta jaro,

La maldekstra bildo, kiun ni, samkiel la aliajn ilustraĵojn por ĉi tiu artikolo, prenis el "Unesko-Kuriero", montras la geston, kiu en la mondo de la surdmutuloj signifas: unuiĝo, unuiĝi, Unuiĝintaj Nacioj, asocio aŭ kunmeti.

La artikolo de *Unesco Courier* ne rilatas favore al la konata sistemo de lip-legado, atentigante pri ĝiaj limigoj kaj malfacilaĵoj unuflanke, kaj la grandegaj klopodoj aliflanke, kiujn la surdmutuloj faras por adaptiĝi al la mondo de sonoj – nenatura por ili – celante tiel evoluigi sian propran kulturon kaj sian personecon por sukcese reensocietiĝi kaj proponi al la socio siajn spertojn kaj kapablojn. Samtiel estas akcentite, ke la aŭdkapabla mondo ofte ne respondas al tiuj proponoj. Oni tamen renkontas tiurilate kuraĝigajn ekzemplojn, inter kiuj estas menciinda tiu de Italio: En la itala televido ĉiun mardon vespere estas elsendata speciala programo por la surdmutuloj, kiu uzas la gestan lingvon. La elsendo enhavas ĉefnovaĵojn de la semajno, kio ofte estas sekvata de distraj aŭ kulturaj programeroj. Similajn televidajn programojn nun postulas ankaŭ surdmutulaj organizaĵoj en aliaj landoj, inter kiuj troviĝas pluraj, kiuj jam faris sukcesajn paŝojn rilate la organizon de la socia kaj kultura vivo de la surdmutuloj (Usono, Sovet-Unio, Danlando kaj Svedio), uzante interalie vidbendojn kun subtitoloj kaj gesta lingvo anstataŭ la sono.

La entrepreno de la Monda Federacio de la Surdmutuloj rilate la normigon de la gesta lingvo havas sian gravecon ankaŭ ekster la kadroj de tiu organizaĵo, ĉar en la medioj de la aŭd- kaj parol-kapablaj homoj pluraj profesioj uzas la gestan lingvon: skafandristoj, arganistoj, havenaj kaj flughavenaj laboristoj, deĵorantoj en la radio- kaj televid-stacioj ktp. Ĉiukaze, la publikigo de la menciita vortaro de gesto-fotoj pravas, ke la handikapita mondo de surdmutuloj sur la kampo de egalrajta internacia komunikado faris multe pli raciajn paŝojn, ol la mondo de tiuj, kies aŭd- kaj parol-organoj tute bone funkcias.

Y.U.



Akriĝo de la lingva demando

JAM EN LA UNUAJ JAROJ de sia laboro CED plurfoje atentigis en diversaj artikoloj kaj komunikoj, ke la lingva problemo en la mondo, anstataŭ simpligi, kiel neinformitaj personoj asertis, komplikiĝas kaj fariĝas ĉiam pli akuta. La dok. A/II/5 "La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj" (1952, ĝisdatigita eldono en 1972) montris, interalie, ke la evolutendenco rilate la uzon de lingvoj en UN, Unesko kaj aliaj organizaĵoj kondukas al pliaj komplikaĵoj. En *La Monda Lingvo-Problemo* (n-ro 2/1969) estis publikigita ampleksa studo pri la temo, en kiu estis eksplicite antaŭvidite: "Kiam la demando de reprezentigo de Ĉinio estos solvita, Unuiĝintaj Nacioj tutcerte akceptos ankaŭ la ĉinan kiel laboran lingvon, kaj tiel finiĝos la diskriminacia distingado inter oficialaj kaj laboraj lingvoj, sed tre kredeble aliaj ŝtatoj aŭ grupoj de ŝtatoj komencos postuli la samajn rajtojn por siaj propraj lingvoj." (p. 101-102).

Ĝusteco de la prognozo

Tiu prognozo, same kiel multaj aliaj faritaj de CED, montriĝis ĝusta. Per sia Rezolucio A/RES/3189 (XXVIII) de la 18a de decembro 1973, la Ĝenerala Asembleo de UN decidis, ke la ĉina lingvo, oficiala jam ekde San Francisko (1945), fariĝu ankaŭ labora lingvo de la Ĝenerala Asembleo, de ĉiuj ĝiaj komisionoj kaj de la Konsilo de Sekureco. Per la Rezolucio A/RES/3190 (XXVIII) de la sama tago la Ĝenerala Asembleo decidis inkluzivigi ankaŭ la araban inter la oficialajn kaj laborajn lingvojn de la Ĝenerala Asembleo kaj de ĉiuj ĝiaj ĉefaj komisionoj. La decido pri la araba, diference de tiu pri la ĉina, estis farita nur post la promeso de la arabaj ŝtatoj-membroj, ke ili "kolektive pagos la kostojn por la realigo de la Rezolucio dum la unuaj tri jaroj." Oni denove povas antaŭvidi kun sufiĉe da certeco, ke tiuj "tri jaroj" longiĝos

senfine, se oni intertempe ne alfrontos plej serioze la tutan problemon ne nur en UN, Unesko kaj aliaj interŝtataj kaj internaciaj organizaĵoj kun daŭre kreskanta nombro de oficialaj/laboraj lingvoj, sed ĝenerale en la nuntempa mondo, kaj se oni ne solvos ĝin radikale prenante en konsideron la eblecojn, kiujn prezentas la Internacia Lingvo.

Privilegio por la riĉaj

Estas gravege noti, ke Usono, kiu, kune kun kelkaj aliaj privilegiitaj landoj, dum multaj jaroj plej energie oponis la grandigon de la nombro de laboraj kaj/aŭ oficialaj lingvoj (v. LMLP, n-ro 2/1969), subite ŝanĝis sian lingvopolitikon kaj tute ne kontraŭstaris la enkondukon de la ĉina kaj araba. Laŭ la oficiala Gazetara Komunikado de la Usona Delegacio ĉe UN (USUN-132(73) de la 18a de decembro 1973), la delegito de Usono en la Kvina Komisiono diris, interalie, ke Usono apogas la Rezolucion favore al la araba, ĉar "la arabaj ŝtatoj konsentis pagi la kostojn de la servoj en la araba". Li emfazis la konatan fakton, ke la aldono de pliaj oficialaj kaj laboraj lingvoj al la jam ekzistantaj "altigos la tuton de la elspezoj preskaŭ en geometria progresio" (rim.: fakte sen "preskaŭ"), kaj tuj eksplicite diris, ke la plej "justa proceduro" estus, ke ĉiuj ŝtatoj-membroj "mem pagu la kostojn de la lingvoservo, kiun ili deziras utiligi, inkluzive la anglan". Alivorte, plia privilegio por la riĉaj, ĉar nur ili povas pagi tiajn grandajn kostojn; plia danĝero por la malriĉaj ŝtatoj. Kompreneble, tia "solvo" por la riĉaj estas nenia solvo por ĉiuj. Ĝi nur kreos novajn tensiojn kaj luktojn.

Situacio en Eŭropo

Post la aliĝo de Britio, Danlando kaj Irlando al EEK, ankaŭ tie la situacio komplikiĝis. Nuntempe "nur" la angla, dana, franca, germana, itala kaj nederlanda estas la laboraj lingvoj de EEK. Bonŝance por ĝi, ĉar Francio, Belgio kaj Luksemburgo akceptas la francan, dum Britio kaj Irlando uzas la anglan (kvankam la Traktato pri aliĝo de Irlando havis aŭtentikan version ankaŭ en la irlanda). Alie estus eĉ pli da lingvoj, ĉar en EEK estas rekonita la plena egaleco de ĉiuj lingvoj. Ĉie — en mondaj dimensioj, en regionaj organizaĵoj, interne de unuopaj multnaciaj ŝtatoj — la problemo de lingva komunikado akriĝas kaj komplikiĝas.

Eĥoj

La seriozeco de la situacio speguliĝas en la kreskanta interesiĝo de la pli vastaj popoltavoloj. La nombro de artikoloj pri la lingva demando konsiderinde multiĝis en la lastaj monatoj. Plej seriozaj periodaĵoj kun vasta legantaro komencas dediĉi al la afero sian atenton.



Privilegio de la riĉaj: En kelkaj internaciaj organizaĵoj nun estas eble aĉeti la "egalrajtecon" de sia propra lingvo.

Menciindaj estas, ekzemple, longa artikolo pri la lingva situacio en UN, publikigita en *The Financial Times* (Londono) de la 26a de aprilo 1974; artikolo de la honorofica direktoro de CED pri la situacio en Eŭropo (kun pledo por solvo per Esperanto), publikigita en la marta numero de *European Community*, kiu estas eldonata en la nomo de la Komisiono de Eŭropaj Komunajoj en Londono, Parizo, Romo, Bonn, Hago, Bruselo kaj Vaŝingtono; artikolo "Paroli la Lingvon", aperinta en la aprila numero de la sama *European Community* kun realeca prezento de la minimumaj rezultoj de lingvolernado, kaj kun malpli realecaj sugestoj por plibonigi la lernadon, k.a.

* * *

CED maksimume streĉas siajn fortojn por trakti la lingvoproblemon en la novaj kondiĉoj. En la limoj de siaj eblecoj ĝi pledas por la Internacia Lingvo per faktoj kaj science bazitaj argumentoj. Ĝiaj dokumentoj kaj aliaj publikaĵoj devus kaj povus esti multe pli utiligataj de la landaj informaj fakoj kaj entute de la organizita Esperanto-movado, kiu siavice devus kaj povus esti multe pli unueca kaj konscia pri sia rolo en la nuna decida periodo por povi efike ekspluati la unikajn ŝancojn, kiujn ĝi prezentas. Oni konsciu, ke lingvaj kolosoj ja kontraŭas Esperanton, sed oni ankaŭ ne forgesu, ke ili samtempe kontraŭbatalas unu la alian, kio ebligas al la Esperanto-movado elludi la antagonismojn inter la grandaj por apogi la malgrandajn kaj akiri, fine, la favoron de ĉiuj.

PRI "ESPERANTO EN PERSPEKTIVO"

Pro gravaj prokrastoj en la presejo kaj en la CO, bedaŭrinde la verko de CED *Esperanto en Perspektivo*:

Faktoj kaj Analizoj pri Internacia Lingvo, kvankam jam delonge finredaktita, ne povos aperi en junio, kiel anoncite. D-ro V. Sadler, la teknika redaktoro, firme promesis dum la aprila kunsido de la Estraro de UEA, ke la verko aperos plej malfrue ĝis la fino de tiu ĉi jaro. Jam pretaj partoj de la libro estos videblaj en la budo de UEA dum la UK en Hamburgo.

Donacoj por CED en 1974

Gesinjoroj Laurie, Britio	£ 5.00
S-ino R. Seddon, Britio	5.00
S-ro E.F. Dean, Britio	10.00
S-ro David A.R. Birkett, Bahreno	1.00
S-ino E. Wolfskehl, Britio	5.00
S-ro Walter Kaukal, Germanio	66.02
S-ro Mag. Isaj Dratwer, Israelo	3.92
Institucio Hodler 68	156.92
F-ino S. de Weerd, Belgio	2.02
S-ro G. Pirlot, Belgio	0.34
S-ro E. Burg, Nederlando	1.16
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio	6.28
Sumo ĝis la 31a de majo 1974	£ 262.66

Al ĉiuj donacintoj koran dankon, speciale al tiuj subtenantoj de CED, kiuj ĉiujare kontribuas laŭ siaj eblecoj al la laboro de tiu ĉi institucio, esence grava por la progresigo de Esperanto. La honorofica direktoro de CED aparte dankas al s-ro Kaukal, mag. Dratwer kaj s-ino Wolfskehl pro la eksplicitaj mencioj de la motivoj: "Apoge al ideoj de la prezidanto en la aprila *Esperanto* ..." (Kaukal), "Por esprimi mian plenan solidarecon kun Prof. D-ro I. Lapenna ... kaj kiel dankon pro lia ĝisnuna agado por Esperanto" (Dratwer), "Kun bondeziroj por sukceso en la gvidado de UEA..." (Wolfskehl).

Sub ĉi tiu rubriko aperas tekstoj verkitaj por la nova eldono de "Enciklopedio de Esperanto".

Hendrik Adamson



HENDRIK ADAMSON, estono, estona kaj Esperanto-poeto, naskiĝis la 6an de oktobro 1891 en Estonio (komunumo Kärstna, vilaĝo Metsakuru, bieneto Patsi). Lia patro estis vilaĝa tajloro, malriĉa kabanulo, la patrino — kamparlaboristino.

Laborante jam ekde sia frua juneco kiel paŝtisto kaj kampservisto ĉe riĉaj bienposedantoj, Adamson akiras al si eblecon komenci lernadon en la loka elementa lernejo de Kärstna (1902 - 1907). Dezirante fariĝi instruisto, li daŭrigas la lernadon en la instruista seminario de la urbo Tartu, kie li sukcesas trovi senpagan loĝeblecon en komuna loĝejo. En 1911 Adamson ricevas instruistan diplomon por elementaj lernejoj. Kiel instruisto kaj lernejservisto Adamson laboras ekde 1911 en Torma (lernejo Võtikvere), en la rusa ministeria lernejo de Raja (1911 - 1918) kaj en la estona lernejo de Raja (1918 - 1919). Post tio li revenas al sia naskiĝvilaĝo kaj eklaboras kiel instruisto en la lernejo de Kärstna (1919-1923) kaj lernejdirektoro (1923 - 1927). Malsaniĝinta serioze en 1927 Adamson ne povas daŭrigi sian profesian laboron. Li transloĝiĝas al sia kabano, konstruita de la patro proksime al la naskiĝloko en 1902. Tie li restas kiel pensiulo kaj profesia poeto-verkisto. Li havas malgrandan parcelon aĉetitan de la ŝtato, bovinon, kelkajn ŝafojn, kampejon por terpomoj kaj legomoj. Li ricevas ankaŭ malgrandan instruistan pension, nesufiĉan por vivtenado, kelkfoje negrandan verkistan subtenon aŭ honorarion pro aperintaj verkoj. Ofte li estas tute malsana, sed daŭrigas verkadon povante sidadi ĉe la tablo aŭ eĉ kuŝante en la lito. Preskaŭ neniam li foriras el la hejmloko, preskaŭ neniu eksterulo lin tie vizitas. Li loĝas kun la patrino ankaŭ tre ofte malsana.

De 1940 ĝis 1945 Adamson laboras en sia hejmloko kiel instruisto de la malgranda lernejo de Lõve. En februaro 1945 li denove serioze malsaniĝis je la hepato kaj restas kuŝanta en la lito. La 7an de marto 1946 Adamson mortas. Lia tombo troviĝas en la tombejo Helme ĉe la urbeto Tõrva, kaj ekde 1957 la tombo estas

indikita per esperantlingva epitafo karakteriza por la verkoj de Adamson:

*Mi ne bezonas oron,
nek ĉiujn trezorojn de l'mondo,
sed sangan mi ploras ploron
pri homaj maljust' kaj senhonto.*

Samvilaĝanoj de Adamson memoras lin kiel eksterordinare bonkoran kaj noblan homon, malgraŭ siaj mizeraj vivkondiĉoj kaj sano ĉiam gajan, societeman, bonhumoran ŝercemulon, kiu hejme ĉiam ion skribis aŭ legis, sed en societo de konatoj elstaris pro gaj-humoraj popolecaj rakontoj.

La unuajn provojn pri verkado Adamson faras jam antaŭ la Unua Mondmilito. Lia unua versaĵo aperas en la gazeto *Postimees* (Poŝtisto) en la jaro 1913. Lia unua versaĵaro *Mulgimaa* (Mulgilando) aperas en 1919. La plej fekunda periodo en la verkado de Adamson komenciĝas en la 30-aj jaroj. Entute aperas de li 6 versaĵaroj kaj unu novelaro, krom tio tri apartaj noveloj, multaj versaĵoj en revuoj *Looming* (Kreado) kaj *Varamu* (Trezorejo), rakontoj en la gazeto *Sakala*.

Manuskripte postrestis elektitaj versaĵoj *Laululaud* (Tablo de kantoj), *Seitsmes* (La sepa) — poemaro, *Loojangu kiired* (Radioj de subiro) — poemaro, 8-scena poemo-teatraĵo *Eluredel* (Ŝtupetaro de vivo), kiuj parte perdiĝis. En la bildo- kaj humoro-riĉaj estonlingvaj poemoj kaj rakontoj Adamson ofte uzas la dialekton de sia hejmloko. La stilo estas sporade burleska, kun motivoj el la estona folkloro. Li pritraktas la hejmlandan naturon, ĉiutagan simplan laborplenan vivon de kamparanoj, iliajn reciprokajn rilatojn, Adamson akre kritikas la burĝan Estonion, la kapitalisman socion, ĝian maljustecon, monavidon de ĝia gvidantaro. Al Adamson apartenas kelkrilate la kulminaj atingoj en la tiamaj estonaj poezio kaj prozo. Kun Esperanto Adamson konatiĝis en 1929 kaj fariĝis entuziasma adepto de ĝi. Lian bonan lingvokonon montras ne nur la versaĵoj, sed ankaŭ la konserviĝinta korespondado kun Helmi Dresen. La unuaj originalaj versaĵoj kaj rakontoj de Adamson en Esperanto aperis

ekde 1932 ĉefe en *Literatura Mondo*, sed ankaŭ en la antologio *Dekdu poetoj* (1934). Post la morto de la poeto liaj versaĵoj aperis kaj aperas en diversaj revuoj, lernolibroj kaj antologioj.

En siaj esperantlingvaj verkoj Adamson pritraktas la samajn temojn kiel en la estonlingvaj. Li bone mastras la Internacian Lingvon, ĉerpas el ĝi abundajn bildajn esprimojn kaj rimojn. “En liaj naturbildoj magie susuras, trilas, zumas la plej sonoraj sonimitoj, la tuta riĉa eblo de la lingvo. Vere oni povas diri, ke ĉi tie la lingvo jam estas ne nur instrumento sed ankaŭ la temo mem. Li preskaŭ ebriiĝas de la esprimpovo de l’lingvo kaj plezuras pri ĝi kvazaŭ diboĉe.” (K. Kalocsay, *Dekdu poetoj*). “Li mirige bone konis kaj posedis la tutan vorttrezoron de la lingvo kaj tre bone perceptis ĝiajn esprimpovojn. Kiel poeto li havis tre fortan senton por sonoj, rimoj kaj ritmo kaj ŝajne estis kvazaŭ kaptita de ili.” (S. Engholm, *Malgranda Revuo* n-ro 3, 1946).

VERKOJ EN LA ESTONA LINGVO: Poemaroj: *Mulgimaa* (Mulgilando), 1919, 1936; *Inimen* (Homo) 1925; *Tõus ja mõõn* (Tajdo), 1931; *Kolletuspäev* (Flaviĝtago),

1934; *Mälestuste maja* (Domo de rememoroj), 1936; *Linnulaul* (Birdkanto), 1937; Elektitaj versaĵoj en la serio *Väike luuleraamat* (Malgranda poemlibro), 1965. Prozaĵoj: *Kuldblond neitsi* (Orblonda virgulino), 1925; *Roheline sisalik* (Verda lacerto), 1925; *Kuldsel elukoidikul* (En la ora vivtagiĝo), 1928.

VERKOJ EN ESPERANTO: *Auli*, eld. Literatura Mondo, Budapest 1934; *Vesperkanto*, eld. J. Régulo, La Laguna 1967.

BIBLIOGRAFIO: L. Kaasik: “Mulgimaa laulik Hendrik Adamson” (Bardo de Mulgimaa H.A.), la gazeto *Uus Elu* n-ro 9, 22. I. 1957. Oskar Kruus: “Hendrik Adamsoni radadel” (Sur vojetoj de H.A.), la revuo *Kultuur ja elu* n-ro 10, 1966. *Estonia Soveta Enciklopedio*, vol. I. Tallinn 1968. K. Kalocsay: Antaŭparolo al *Dekdu poetoj*, eld. Literatura Mondo, Budapest 1934. Drago Kralj: *Kvar prelegoj pri Esperanta literaturo*, eld. sekcio de Slovenia E-Ligo, Ljubljana 1960. Stellan Engholm: “Hendrik Adamson”, *Malgranda Revuo* n-ro 3, 1946. *Gvidlibro por supera ekzameno*, eld. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1966. Hilda Dresen: “Adamson kaj lia verko”, enkonduko al *Vesperkanto*, J. Régulo, La Laguna 1967.

Jaan Ojalo

Recenzoj

Utila, zorge farita libro

Recenzas Klaus Schlüter (FR Germanujo):

A vállalatirányítási számítógép-alkalmazás fogalmainak több nyelvű szótára (Komputil-teknika vortaro), hungara-germana-angla-rusa-Esperanta, de Siklaky István kaj Ruisz Rezső. Budapest: Számítástechnikai Oktató Központ, 1972. 464p. 19cm.



Antal Münnich, budapeŝta fakulo en la kampo de komputiloj, redaktis ĉi tiun verkon.

Temas pri kvinlingva fakvortaro pri la apliko de komputeroj (hungara, germana, angla, rusa, Esperanto). La aldonon de kromaj lingvoj sen ŝanĝo permesas praktika listomendo: ĉiu lingvo havas apartajn laŭteman, kodnumeran kaj alfabetan vortolistojn; la konekton por la uzo donas kodnumero por ĉiu koncepto. Por ni estas valore, ke tia libro ekzistas; sed ankaŭ pro la ampleksa, lerte prilaborita vort-trezoro ĝi estas tre uzinda por ĉiu fakulo. Ni diru kelkajn vortojn pri ĝia maniero de vortelekto aŭ vortfarado. Sufiĉe ofte ĝi uzas vortradikojn troveblajn en PIV, kelkfoje kun adaptita difino: *bufro*, *formato*, *kerno*, *kodo*, *regi*, *testo*. La aŭtoroj ankaŭ virtuoze uzas afiksojn por trafi signifon; *duuma numeralo*, *aropa prilaborado*, *periferiero*, *programaro*, *regilo*, *nulumo*, *ciferecigi*, *simulilo*, *ajnrica*, *pera adreso*, *disordigi* — ĉio senpere komprenebla al fakano. Eble oni devus bedaŭri, ke kelkaj plastikaj esprimoj de la angla estiĝas pli sekaj en Esperanto: “debug” fariĝas “erarserĉo”, “dummy” fariĝas “kvazaŭinstrukcio”; sed aliaj restas same klarbildaj, kiel ekz. *maso* kaj *salto* (en programoj).

Kompreneble, tia vortaro temas ĉefe pri “karaktra komputilo” (digital computer) — diskutenda termino. Kelkaj legantoj eble memoras, ke la recenzanto ofte esprimis sin kontraŭ la PIV-artvorto “komputero” kaj preferas la naturan “komputilo”; nia libro ankaŭ uzas

la verbon “komputi” (ekz. “komputopreta dokumento”) en tiu senco. La tre ofte ripetata “karaktro” (cifero aŭ alfabeto signo) apartenas al la pli malbelaj inventoj; eble tial ĝi suferas eĉ dufoje je prezeraroj (p. 387 kaj 403), kiuj cetere estas en la Esperanta parto ne pli oftaj ol en la angla aŭ germana partoj. Resume: kun sufiĉa zorgemo farita libro, en klara lingvo, utila en sia fako.

Mendu ĉe UEA: 19,20 (por Nederlando 19,97) gld. plus sendokostoj 10%.

Esploro kaj trovo

Recenzas Michel Duc Goninaz (Francujo):

Esploroj, de Baldur Ragnarsson. La Laguna: J. Régulo, 1973. 122p. 19cm.

La aŭtoro de *Ŝtupoj sen nomo* kaj tradukinto de Thorsteinn frá Hamri ĵus donis al ni novan poemaron. Poezio estas esploro, li asertas, kaj trovo de io ekzistanta, nur ŝajne kreo. Tiel praviĝas la titolo. Ĝi ankaŭ estas, kiel asertas la aŭtoro en la prologo, “maniero kapti disfluantan senton por ĝin fiksi en spaco kaj tempo.”

El tiu senlaca meditado super Homo, Naturo, Vivo reliefigas kelkaj fortaj ideoj, ekzemple

*ke fremdo estas taŭga eskaprimedo
el familiara denso*

(riĉega intuiciaĵo, pri kio indas longe mediti) aŭ ke

*neniam
desegnas sin
oratore
la vero*

sed male nur “kresko validas”.

Ĉi-lastata ideo vaste kaj riĉesprime disvolviĝas en la cikloj *Difinoj* kaj *Ĉe la rando*, kaj ankaŭ en *Glacio*, kie la vereco difiniĝas kiel

*kompromiso aranĝita
inter realo kaj iluzio
mezvoje
inter glacio kaj akvo.*

Glacio, akvo, suno, floroj, ne estas tradiciaj poeziecaj bildoj, sed signaloj kaj simboloj sur la vojo, kie

*la veron serĉas
la poeto
per tiaj vortoj
servantaj
por lia dispono.*

Kaj la demandoj, lirikaj kaj poeziecaj, sed samtempe metafizikaj, de la p. 47 trovas respondon, provizoran, necertan, svagan, en la sopiro al universo sen anguloj, sen abruptoj, sen vertikalaj de la *Odo al la ruĝa koro*,



Baldur Ragnarsson: Poezio estas esploro.

pli precizan en la stoikismo (aŭ hedonismo, aŭ ambaŭ?) de la *Celo sen difino* (la “plej liberiga”) kaj eble ĉefe en la forlaso de ĉiaj ambicioj, esprimita en la *Ĉerizarboj de Lucullo* kaj en la lastaj versoj de *Nerimarkitaj herboj*.

La esperantlingva poezio bone fartas. Tion atestas tiu ĉi leginda poemaro de unu el niaj elstaraj poetoj.

Mendu ĉe UEA: 7,50 (por Nederlando 7,80) gld. plus sendokostoj 10%.

Nur pedanta kronologio

Recenzas Ulrich Lins (FR Germanujo):

Kvindek jaroj de Esperanto en Oomoto, de E. Ito, N. Esumi kaj T. Nakamura. Kameoka: EPA, 1973. 90p. 21cm.

“Mi firme kredas,” diris Majstro Onisaburo, “ke post dek jaroj ĉiuj homoj kiuj ne povoscias Esperanton, certe fariĝos postrestuloj de la epoko. Mi jam havas la intencon ne nur disvastigi ĝin tra Japanujo, sed ankaŭ returne importigi ĝin en la landojn de Eŭropo, de kie ĝi venis.” Tiel komenciĝis la Esperanta aktivado de Oomoto, kies 50-jara disvolviĝo estas la temo de tiu ĉi memorlibro, kaj kvankam la fina intenco, karakteriza por la misiemo de unu el la plej kolorplenaj figuroj en la moderna historio de Japanujo, ankoraŭ atendas sian realigon, oni apenaŭ povas tro alte taksi la kontribuon, kiun gratulinde donis kaj plue donas Oomoto por la pliuniversaligo de Esperanto.

Bedaŭrinde la kompilintoj decidis prezenti al la publiko, krom kelkaj dokumentaj aldonoj, nuran kronologion, en kiu estas preskaŭ pedante registrita amaso da nomoj, kursoj, vojaĝoj k.s. Unuflanke, la leganto ne facile scios memori la historian fonon de tiuj faktoj, kaj ial la aŭtoroj eĉ preterlasis mencii aliajn agadojn de Oomoto, kunligitajn kun la Esperanta, ekz. la sisteme imponan kolektadon de subskriboj kontraŭ atombomb-eksplodoj. Aliflanke, la perdiĝo en troo da

detaloj kaŭzas, ke la leganto ne akiros kredeble sufiĉan komprenon pri la rolo de Esperanto en la idearo de Oomoto nek imagon, kial tia jen tre tradiciisma, jen surprize progresema religio suferis du fortajn persekutojn de "barbara" registaro. Kun scivolo ni legus, ekzemple, analizojn de kompetentaj japanaj fakuloj pri la signifo de la internaciismo propagandata de Oomoto sub malsamaj politikaj kondiĉoj.

Tamen, ni devas kun plezuro bonvenigi tiun ĉi jubilean verkon, kiu atestas, kiom entuziasme laboradis la oomotanoj dum duona jarcento por Esperanto kaj la ideoj de paco kaj interhoma kunlaboro.

Mendu ĉe UEA: Prezo anoncota.

La sepa hajkaro

Recenzas William Auld (Skotlando):

Finalo '73, de diversaj aŭtoroj. Oosaka: Hajkista Klubo, 1973. 44p. 18cm.

Jen la sepa en la serio de poemaroj ĉiujare eldonataj de la Hajkista Klubo, kaj kiel la titolo indikas, ĝi estas provizore la lasta. Eble prave, la poetoj timas, ke tro longa koncentriĝo ekskluzive al la mallonga hajkiformo riskigas ŝablonecon. Jam la sesopo de 1967 reduktiĝis al kvaropo. Tio tamen ne signifas, ke ŝabloneco sentiĝas en tiu ĉi volumo. Ueyama kompreneble plu vivas en la ombro de tiu funebro, kiun li tiel potence-emociĝe solenis en la pasintjara kolekto: *Pri l'viv' surtera / plendas vin, mortpala luno, / ĉi vidv' mizera*. Tomita, ĉiam pli konkreta, kroĉas atenton per la observita signifa detalo: *Post uragano / aŭdiĝas takte gutoj / de akvokrano*. Tanako estas anime ligita al la sezonociklo: *Neĝ' sur deklivo / al monto – skiantoj en / form' de kursivo*. Sed la majstreco de Miyamoto sentiĝas tiel kresĉende, ke unuopa ĉitaĵo ne sufiĉas por juste komuniki ĝin. La gravecon de tiu ĉi skolo plene rekonos la estonteco. Intertempe ni fidas ilian promeson, ke ili "ne siestos en la kuliso". Kaj kun la alaŭdo ni ekkrias: Bis!

Mendu ĉe UEA: 1,80 (por Nederlando 1,87) gld. plus sendokostoj 10%.

Patina verko

Recenzas Emilija Lapenna (Jugoslavio):

La lanternisto kaj aliaj prozaĵoj, de H. Sienkiewicz k.a. Elektis kaj trad. Kabe. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag. Represo. 207p. 20cm.

Sen aparta talento pri sociaj analizoj, eblas scii, ke la esperantistaro en sia ĉefa parto ne estas juna. Pruvon pri tio liveras rigardoĵeto sur iun ajn kongresfoton.

Tion scias multaj, kaj ne mirige, ke tion scias ankaŭ eldonistoj. Al tia publiko certe pli plaĉas la polurita realismo de Sienkiewicz, ol la nuda kaj kruda prozo de hodiaŭaj verkistoj. Pro tio la dana eldonisto reaperigis prozaĵon el la jaro 1905, kun antaŭparolo de Th. Cart. La tempo kruele malaktualigis plurajn vortojn de Th. Cart, dum la prozaĵoj mem, ĉar multaj majstroverkoj, restis loga legaĵo. Sur la kovrilpaĝo pompas la nomo de la plej konata pola verkisto Sienkiewicz, Nobel-premiito, sed liaj verkoj, inter kiuj ankaŭ fragmento el *Quo Vadis*, okupis nur 55 paĝojn. La temo de *La lanternisto* estas patriotismo kun senteblo patino de forflugintaj jaroj, kiun econ ne enhavas samtema novelo *Srul el Lubartov* de eksterlande nekonata aŭtoro Szymanski. Dum ekzistos homoj perforte aŭ memvole forlasintaj sian patrujon, *Srul* parolos al ilia koro. Amo, legendoj, patriotismo, literatura filozofado pri vivofenomenoj, jen tio estas la temoj de tiu prozaĵ-girlando. Ĉio finiĝas per vortoj de la Literatura Komitato de F.L.E., estimindaj sed ne nepre necesaj. Preferinda estus mallonga prezento pri la aŭtoroj.

Mendu ĉe UEA: 10,20 (por Nederlando 10,61) gld. plus sendokostoj 10%.



Esperanto in New Zealand, 1904-1963 (1973) W.H. King. 332p. 26cm. Bind. 37,80 gld. Tre detala historio anglalingva de la novzelanda Esperanto-movado.

Glufiŝeto "Esperanto" kun verda stelo oblikva. 6 x 14cm. Plasta, kun nigra kaj verda preso. 0,72 gld.

Katalog over interlingvistisk litteratur i Universitetsbiblioteket i Oslo (1973) T.A. Høeg. 88p. 23cm. Broŝ. 8,10 gld. Decimale katalogo pri 667 eroj, kun indeksoj pri nomoj kaj temoj.

Katolika terminaro Esperanto-angla (1974) G.N. Pausback. 60p. 21cm. Broŝ. 1,50 gld. (Serio de IKI, 26).

La "Mio" kaj lia pretero kaj La pralampo en la muzeo Dun Karm (1871-1961). El la malta tradukis C. Mallia (1973). 35p. 22cm. Broŝ. 3,30 gld. Du poemoj de la nacia poeto de Malto, kun konciza enkonduko.

Nikolaj Rytjkov, elektitaj eroj (1974) 30cm. 33 t/m. Monofona. 15,— gld. 18 pecoj eldonitaj memore al la rusa aktoro: kvin estas de Kalocsay, tri de Kurzens, du de Shakespeare kaj aliaj de Gorki, Rossetti, Soljenicin, Auld, Boulton, Saburo kaj Rytjkov mem.


Nuda inter lupoj (1959) B. Apitz (1900 -). El la germana trad. K. Schulze (1974). 480p. 20cm. Bind. 12,— gld. Romano el la koncentrejo Buchenwald.

Planktono kaj mara produktado (1974) E. Balech. 88p. 29cm. Broŝ. 18,90 gld. Kursoteksto el la Someraj Universitataj Kursoj de 1974.

Por pli efika informado (1974) I. Lapenna (1909 -). 20p. Ilus. 22cm. Broŝ. 2,25 gld. Utilaj kaj praktikaj konsiloj pri informado, en 16 ĉapitroj kaj konkludo.

Poŝtkartoj kun receptoj Ses diversaj bildkartoj, ĉiu kun simpla avokado-recepto. Po 0,10 gld.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.



**LA 30A INTERNACIA
JUNULARA
KONFERENCO**
1974 08 03 – 08 10
Münster,
FR Germanujo
Adreso: 30a IJK
Mondstr.3, D-44 Münster.

La lasta alvoko por la IJK

LA ORGANIZANTOJ de la 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO solvis la plej grandan problemon de la aranĝo — la fincan (v. apartan novaĵon sur ĉi tiu paĝo). Nun ankaŭ la programeroj, al kies realigo kun rezervoj rilatis la lasta gazetara komuniko de la LKK en Münster, efektiviĝos sen fincankaj riskoj. La programo antaŭvidas, ke la laboroj de la Konferenco disvolviĝos en almenaŭ ok laborgrupoj, kiuj traktos jenajn temojn: internacia junulara interŝanĝo, junulara politiko, problemoj de fremdlingva instruado, lingva cibernetiko kaj ĝia rilato al la Esperanto-instruado, reformo de altlernejoj, edukado al paco, kontraŭaŭtoritata edukado, instruado de natursciencaj fakoj, elokventeco kaj praktika edukado. Aparta laborgrupo traktos laborplanon por la estonta agado de la junulara sekcio de UEA. Inter la gvidantoj de la laborgrupoj oni mencias ankaŭ la nomojn de d-ro H.M. Maitzen, P. Peeraerts kaj d-ro W. de Smet. Krome, nun estas tute certe, ke en la kadro de la Konferenco prelegos ankaŭ la lastatempe tiel ofte menciata prof. d-ro Helmar Frank de la Universitato de Paderborn, kiu traktos la temon “Lingvo-politiko por Eŭropo”.

En la Seminario “Lingvo kaj socio”, kiu okazos samtempe kun la Konferenco (v. la majan numeron de nia revuo, p. 95), kiel anoncote, prelegos ankaŭ prof. Jan Knappert el Londono. Nun estas konataj ankaŭ la temoj de liaj du prelegoj: “Ŝtatoj kaj lingvoj en ili

parolataj” kaj “Problemoj de komunikado en junaj respublikoj de Afriko”.

En la distra parto de la programo, pri kiu ni jam pli frue raportis, ĉefrolas la Drama sekcio de Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb (Jugoslavio), kiu prezentos la komedion *Kion vidis la hotelservisto?* de la angla verkisto Joe Orton.

Ankaŭ la aliĝado al la 30a IJK evoluas kontentige. Kelkajn tagojn antaŭ la fino de majo oni raportis, ke jam aliĝis 172 gejunuloj el 25 landoj. Konsiderante antaŭajn spertojn en la organizado de similaj aranĝoj, kiam preskaŭ duono da partoprenantoj aliĝis lastmomente, la LKK en Münster timas, ke ĝi ne sukcesos loĝigi ĉiujn aliĝontojn al la Konferenco. Tial oni avertas, ke, kvankam la aliĝoj estos eblaj ankaŭ ĉe la TEJO-ĝiĉeto en la 59a UK en Hamburgo, ne estas prudente ĝis tiam prokrasti la decidon pri la partopreno. La organizantoj jam antaŭe anoncis, ke la maksimuma kapacito de la luitaj studentaj domoj estas 220 personoj. Por faciligi la decidon pri la aliĝo, ni ripetas la validajn aliĝkotizojn, kiuj inkluzivas ankaŭ la loĝigon kaj manĝojn dum la konferenca semajno:

Ĝis la fino de junio, la membroj de TEJO/UEA pagas 85 (malpli ol 20-jaraj), 105 (20 - 25-jaraj) kaj 115 (pli ol 25-jaraj) germanajn markojn. Post la 30a de junio, laŭ la menciitaj aĝogrupoj, la kotizoj estos: 110, 120 kaj 130 germanaj markoj. La ne-membroj de TEJO/UEA en ĉiuj kazoj pagas aldonajn 10 germanajn markojn. Ĉiujn pagojn oni sendu al la poŝtĉekkonto n-ro 1196 20-468, Dortmund, aŭ al la bankkonto n-ro 776396 ĉe Kreissparkasse Münster; en ambaŭ kazoj por: Ulrich Brandenburg, Sonderkonto IJK, Vadrup 276, D-4401 Westbevern, FR Germanio.

La organizantoj de la 30a IJK aparte petis, ke ĉiuj korespondaĵoj por la Konferenco estu adresitaj kiel indikite ĉi-supre, sen la nomo de G. Jungkamp, kiu ne plu loĝas en Münster. Tiuj, kiuj kutimis telefone kontakti la organizantojn, notu la novan numeron: (02504) 83 60.

Nova subvencio al TEJO

SUB LA SAMA TITOLo ni aperigis informon en la maja numero de la revuo (p. 95), raportante pri la subvencio de 17 000 francaj frankoj, kiujn al TEJO asignis la Eŭropa Junulara Fondaĵo el Strasburgo. Fakte, la sumo pri kiu ni raportis, estis nur la unua parto de pli granda financa apogo al la junulara sekcio de UEA, kiu ricevos pliajn 40 000 francajn frankojn de la sama Fondaĵo. La granda subvencio (entute ĉ. 30000 guldenoj) estas destinita por kovri parton de la elspezoj de la 30a Internacia Junulara Konferenco de TEJO en Münster kaj la Seminario “Lingvo kaj socio”, kiu okazos en la kadro de la Konferenco.



Kongresa Komunikilo

59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 — 08 03

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.


Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanujo.

Nova Alta Protektanto anoncota

Lige kun ŝanĝoj en la registaro de Federacia Respubliko Germanujo, okazintaj dum majo, la ĝisnuna Alta Protektanto de la 59a Universala Kongreso, d-ro Klaus von Dohnanyi, perdis sian oficon de federacia ministro por klerigo kaj scienco. Nova Alta Protektanto estas anoncota.

Honora Komitato nun formata

La antaŭviditaj ŝanĝoj en la federacia registaro kaj novaj balotoj lastatempe okazintaj pri la Hamburga Senato kaj registaro malebligis formi pli frue definitivan Honoran Komitaton por la 59a UK. La Honora Komitato estas nun formata kaj estos anoncita en la Kongresa Libro.



La kongresejo: Parto de la Salono 1, en kiu okazos la Solena Inaŭguro de la 59a Universala Kongreso.

Ankoraŭ pli da karavanoj al Hamburgo!

Vagonaran karavanon ekde Utrecht en Nederlando anoncas s-ro R. Moerbeek, p/a UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002. La grupo ekveturos sabaton, la 27an de julio, matene kaj reveturos sabaton, la 3an de aŭgusto, posttagmeze. La karavano prezentas 30%-an ŝparon je la normala tarifo en FR Germanujo. Limdato por aliĝo: la 15a de junio.

Aviadilan karavanon kun postkongresa rondveturado tra norda Germanujo kaj Danlando anoncas Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, Rue de la Cerisaie, F-75004 Paris. La grupo ekflugos el Parizo la 26an de julio kaj reflugos el Hamburgo la 14an de aŭgusto. Prezo, inkluzive de la rondveturado kaj survoja restado kaj ekskursoj: 1 790 frankoj. Limdato estas la 15a de junio.

Komunaj loĝejoj ankoraŭ mendeblaj!

Ankoraŭ restas liberaj litoj (se vi rapidas!) en komuna loĝejo, situanta en la junularparko Langenhorn, iom malproksime de la Kongresejo sed, kompanse, je malalta prezo: po 9 markoj por ĉiu nokto, kun matenmanĝo. Junuloj ĝis 20-jaraj pagas nur po 6,— markoj. Speciala mendilo estas ricevebla ĉe LKK-anino f-ino Hella Lanka, D-2000 Hamburg 71, César-Klein-Ring 14, FR Germanujo.

Statistiko

Ĝis la 23a de majo aliĝis 1 349 personoj el 48 landoj. Jen la laŭlanda situacio: Argentino 5, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 32, Belgujo 25, Brazilo 4, Britujo 58, Bulgarujo 55, Ĉeĥoslovakio 7, Danlando 55, Egiptujo 3, Finnlando 68, Francujo 134, Germana DR 1, FR Germanujo 300, Grekujo 6, Hindujo 1, Hispanujo 31, Hungarujo 13, Irano 1, Irlando 1, Islando 2, Israelo 7, Italujo 68, Japanujo 44, Jugoslavio 49, Kanado 9, Koreujo 1, Kuvajto 1, Luksemburgo 1, Malagasa Resp. 1, Meksiko 5, Monako 1, Nederlando 124, Norvegujo 14, Nov-Gvineo 1, Nov-Zelando 3, Paragvajo 1, Polujo 22, Portugalujo 6, Rumanujo 2, Soveta Unio 4, Sud-Afriko 2, Svedujo 98, Svisujo 38, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 38, Zairo 3.

Kromé estas ricevataj pli ol 80 provizoraj sinanoncoj de personoj, kiuj pro pasportaj aŭ devizaj obstakloj ne povas aliĝi antaŭ la Kongreso, sed kiuj intencas aliĝi post la alveno en Hamburgo.

Kvankam la aliĝoj estos akceptataj ĝis la lasta momento, kaj eĉ dum la Kongreso mem, por tiuj, kiuj ankoraŭ volas veni al Hamburgo, estas rekomendinde aliĝi tuj. Oni nur tiamaniere povas esperi, ke la aliĝilo venos al la konstanta adreso en Rotterdam antaŭ la oficiala limdato — la 20a de junio —, kio al la ĝustatempaj aliĝintoj ŝparas 25,— guldenojn, pagendajn post la limdato aldone al la kongresa kotizo.



La Urba biblioteko de Kortrijk en Belgio per aparta solenaĵo, okazinta la 25an de majo ĉi-jare, inaŭguris sian Esperanto-fakon kun la nomo "Fondaĵo Cesar Vanbiervliet". La Fondaĵo estas rezulto de multjara pacienca kaj sindona laboro de s-ro C. Vanbiervliet, vicdelegito de UEA en Kortrijk, kiu sukcesis kolekti pli ol 3 000 librojn kaj jarkolektojn de Esperantaj revuoj. La inaŭguran solenaĵon, kiu vaste reeĥis en la nacia gazetaro, partoprenis pluraj eminentaj gastoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ la prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj de la Belga Parlamento, s-ro Dries Dequae, kiun ni vidas (dekstre sur la foto) interparoli kun s-ro Vanbiervliet. (Foto: J. Strosse, Kortrijk).

Brazilo

- Laŭ informo de s-ro L. Brieger, li ricevis la rajton traduki la materialon de *Esperanto programita* de H. Behrmann en la portugalan lingvon. Pri eldono de la lernolibro interesiĝas la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, landa asocio de UEA en Brazilo.

Britio

- Post la balotoj en Britio, komence de ĉi tiu jaro, la Esperanta Parlamenta Grupo kreskis de 31 al 44 parlamentanoj-membroj. Laŭ informo de Brita Esperanto-Asocio, kiu aktive kampanjis antaŭ la balotoj, la Parlamenta Grupo nun, interalie, traktas eventualan reprezentigon en la 59a UK kaj delegacian viziton al la brita ministro pri edukado.

Ĉilio

- Nuntempe funkcias en Ĉilio koresponda kurso de la Internacia Lingvo, kun partopreno de 35 personoj. La kurson verkis kaj gvidas s-ro Ivan

Mättig, delegito de UEA en la ĉilia ĉefurbo. En sia letero, kiu atingis nin meze de majo, s-ro Mättig ne mencias "persekutojn de ĉiliaj esperantistoj", kion aludis kelkaj periodaĵoj.

Suda Vjetnamio

- S-ro Francisko Simonnet, kiu jam dum pluraj jaroj instruas ĉe la Universitato de Sajgono, prelegis la 3an de aprilo 1974 en la tiea sidejo de L'Alliance Française. La prelego, kies titolo estis "Portreto de unu lingvo: Esperanto", okazis sub la patroneco de la sud-vjetnama vicministro pri kulturo, edukado kaj junularo, kaj pri ĝi amplekse raportis pluraj sajgonaj ĵurnaloj.

FR Germanio

- En sia simpozio, fine de aprilo en Wiesbaden, la germana Asocio pri Programita Instruado elektis s-ron Hermann Behrmann gvidanto de laborgrupo pri interlingvistiko kaj lingvocibernetiko. Dum la simpozio

pri la Internacia Lingvo prelegis, krom H. Behrmann, ankaŭ d-ro H. Kasselmann. Samtempe oni en la urbo aranĝis apartan kunvenon dum kiu prelegis G. Becker, H. Frank kaj H.M. Maitzen, kaj L. Pickel aranĝis ekspozicion.

Israelo

- La Israela Frukto-Konsilantaro, ŝtata entrepreno por la enmerkato kaj reklamado de la israelaj fruktoj (unu el la ĉefaj eksportaĵoj de la lando), dank' al la entreprenemo de s-ino Anat Zdunski-Zajdman, junulara delegito de UEA en Tel-Aviv, eldonis ses belajn kolorajn bildkartojn en la Internacia Lingvo. La kartoj surhavas apetitigajn receptojn por prepari delikaĵojn el la israela frukto avokado. La bildkartoj estas senpage haveblaj kontraŭ unu respondkuponon ĉe: P.k. 33147, Tel-Aviv, Israelo.

Eŭropo

- La agado, kiun entreprenis Eŭropa Esperanto-Centro (pri kio ni raportis en la maja numero de nia revuo, p.84), bone progresas. Laŭ informoj, kiuj venas de s-ro M.Govaers, ĝenerala sekretario de Eŭropa Kultura Centro en Ĝenevo, tie oni estas kontenta pri la reeĥo, kiun vekis la Esperanta eldono de *Eŭropa Dokumentaro*. Tamen, la Centro en Ĝenevo bonvenigus pli da kunlaboro flanke de esperantistoj. Necesas helpo por traduki tekstojn en la Internacian Lingvon; bonvenus artikoloj pri eŭropaj temoj (ekonomio, sociaj problemoj, lingvaj demandoj, edukado ktp), samkiel traduko de tiaj artikoloj en naciajn lingvojn. Krome, oni ŝatus rekte ricevi opiniojn pri *Eŭropa Dokumentaro*, kiujn oni sendu al: s-ro M.Govaers, 122, rue de Lausanne, CH-1202 Genève, Svisl.

Usono

- S-ino C. Schulze, vicprezidentino de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, kaj s-ro Ch. Power, direktoro de la Centra Oficejo de ELNA, antaŭ kelka tempo reprezentis la usonan landan asocion de UEA en grava konferenco de studentaj Unesko-kluboj en Usono. En la Kolegio de San Mateo, kie la konferenco okazis, la reprezentantoj de ELNA aranĝis sukcesan ekspozicion pri la Internacia Lingvo. Diversnacia studentaro montris grandan intereson pri la lingvo kaj Movado.

Vortaroj

• En Sovet-Unio aperis *Esperanto-rusa* vortaro de la antaŭ du jaroj forpasinta prof. Bokarev. Same kiel lian unuan leksikologian verkon (*Rusa-Esperanta vortaro*), ankaŭ ĉi tiun publikigis la renoma eldonejo "Soveta enciklopedio" en Moskvo. La nova vortaro apartenas al la plej ampleksaj verkoj en sia branĉo; ĝi estas 488-paĝa kaj enhavas 26 000 vortojn; en Sovet-Unio ĝia prezo estas nur 0,93 rublojn.

Bibliotekoj

• Marjorie Boulton, la fama Esperanta verkistino, estas vaste konata ankaŭ inter anglalingvaj studentoj pro siaj vervaj legolibroj kaj literaturaj studoj. En unu el siaj plej novaj anglalingvaj verkoj, *Reading for Real Life* (Legado por vera vivo), f-ino Boulton plurloke lerte uzas Esperanton kaj scivoligas la lernanton pri la Internacia Lingvo. Estas rekomendinde, ke la esperantistoj, instruataj en anglalingvaj lernejoj, zorgu, ke la lerneja biblioteko nepre havigu la verkon. (Eldonis: Macmillan, Londono, 1971).

Informado

• Komence de aprilo, en Tijuana, Meksikio, okazis Pacifika Esperanto-Konferenco, kiun, krom pluraj dekoj da usonanoj, partoprenis ankaŭ kelkaj geesperantistoj el Meksikio. La ĉeftemo de la Konferenco estis "Informagado en la Esperanto-movado". Dum la Konferenco oni organizis apartajn seminariojn pri la informagado en la medioj de radio kaj ĵurnalaro, kaj dum aparta seminario oni traktis la arton de publikaj prelegoj.

Prelegvojaĝoj

• Dana Esperanto-Asocio havas kiel apartan fakon la Prelegvojaĝan sekcion, kiu ankaŭ dum la pasinta vintro gastigis dueksterlandajn prelegantojn: d-ro A. Goodheir el Skotlando kaj s-ro I. Eöry el Hungario prelegis en pluraj lokaj Esperanto-kluboj kaj en neesperantistaj rondoj. Nun oni planas novajn prelegvojaĝojn kaj atendas proponojn tiurilate: DEA, Hørsholmsalle 5, DK-8240 Risskov, Danio.

Fervojistoj

• La Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), laŭnombro la plej forta kaj unu el la plej aktivaj fakaj asocioj aliĝintaj al UEA, okazigis sian 26an Kongreson en Tarragona, Hispanio, inter la 11-a kaj la 17-a de majo ĉi-jare. Al la Kongreso de IFEFF venis preskaŭ 650 partoprenantoj el 17 diversaj landoj. Tarragona, en kiu en la jaro 1968 okazis TEJO-kongreso, ankaŭ ĉi-foje montriĝis tre larĝanima gastiganto kaj la fervojista Kongreso ĝuis plurajn avantaĝojn kaj apogojn, inkluzive de granda priatento de la gazetaro, radio kaj televido. La Komitato de IFEFF elektis en Tarragona novan estraron, kun s-ro Joachim Giessner (FR Germanio) kiel prezidanto. Multjara ĉefdelegito de UEA en Svislando, s-ro Otto Walder, dum la Kongreso estas distingita per ora medalo de FISAIC, internacia kultura organizaĵo de fervojistoj, kiu aŭspiciis la Kongreson en Tarragona.

Literaturo

• Fremdlingva Eldonejo el Pekino ĵus reeldonis la plenan kolekton de *Noveloj de Lusin*, kies unua eldono (1963) jam delonge elĉerpiĝis. La nova eldono estas kompletigita per kelkaj pecoj, kiuj antaŭe mankis en la plej brila volumo, kiu ĝis nun venis el Pekino. Cetere, freŝe aperintaj estas ankaŭ 89-paĝa infana bildlibro *Heroaj fratinetoj sur la stepo* kaj bildkartaro *Pejzaĝoj de Guĵlin*.


Komerco

• La eldonejo Kluwer, Deventer (Nederlando), kiu fine de februaro ĉi-jare finpretigis la ampleksan terminaron *Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj* de F. Muniksma k.a., anoncas, ke el la eldonkvanto de 3000 ekzempleroj, fine de majo, duono jam estis disvendita. La Libroservo de UEA vendas la vortaron kontraŭ rabatita prezo de 57,50 (por Nederlando 59,80) guldenoj.

Persone

Wood

• Prof. d-ro Richard E. Wood, kiu antaŭ nelonge estas nomita kiel redaktoro de la prestiĝa revuo *La Monda Lingvo-Problemo*, ĵus akceptis novan universitatan postenon en la proksimeco de Nov-Jorko. Profesoro Wood fariĝis estro de la lingvistika



fako en la malnova Universitato Adelphi. Kunlaborantoj de *LMLP* bonvolu noti la novan adreson: Department of Languages, Adelphi University, Garden City, L.I., N.Y. 11530, Usono. Dum junio kaj en la unua duono de julio ĉi-jare, prof. Wood lekcios en somera sesio de usona universitato, okazanta en Munkeno, FR Germanio.

Pancer-Tuksar

• Fine de majo ĉi-jare, la Antverpena Esperanto-Societo "La Verda Stelo" aranĝis kelkajn klavicenajn koncertojn, kies programon plenumis juna jugoslavia artistino, s-ino Ranka Pancer-Tuksar, filino de la bone konata prof. Oton Pancer el Zagreb. La koncertoj de la juna artistino (cetere ankaŭ esperantistino) estis sukcesaj publikaj aranĝoj al kiuj venis ankaŭ multaj neesperantistoj. Cetere, la antverpena klubo jam dum kelkaj jaroj efektivigas ambician planon de kulturaj aranĝoj, en kiu la ĵusaj koncertoj estis plia sukceso.

Hagler

• Prof. Margaret Hagler, kiu antaŭ kelkaj jaroj doktoriĝis pri la Esperanta literaturo, kaj nun lekcias ĉe Lincoln Land Community College, Springfield, Illinois, Usono, estas kunordiganto de la preparoj por la ĉi-jara Esperanto-seminario de la Modernlingva Asocio de Usono (Modern Language Association), kiu okazos fine de la jaro en Nov-Jorko. La temo de la seminario estos: "Kiujn verkojn devus enhavi Esperanta antologio de la usona literaturo?"

N-ro 479, 1974 - 04 - 30

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

HISPA: Faustina Martínez Guillén.
USONO: James E. Jenkins filo.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1974

BEL: 177 Sven Ziegler. BRAZ: 178 Carlos Augusto Siquiera da Cunha, 179 José Romão Filho, 180 Adonis Marcelo Saliba Silva. BRIT: 181 R. Murray. FRA: 182 J.P. Beau. FRG: 183 B. Hasecke. HISP: 184 Josep Castelltort Riba. ITA: 185 A. Casetta, 186 Rosario Sgroi. SVED: 187 Erik Åkerlund, 188 A. Blid, 189 G. Carlsson, 190 L. Carlsson, 191 S. Edvardsson, 192 Elna Jansson, 193 A. Johansson, 194 T. Julin, 195 L. Lagerkrantz, 196 H. A. Leijder, 197 B. Lindström, 198 J. Lokna, 199 H. Lundin, 200 G. Mellberg, 201 Agda Olsson, 202 E. Rytenberg, 203 E. Schuldenfrei, 204 S. Stenström. U-SONO: 205 R.H. Beard, 206 Stefan Chobanoff, 207 R.R. Neri, 208 F. Thomas, 209 Humphrey Tonkin, 210 E. D. Walters.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1974 - 07 - 15 neniu membro

protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

AŬSTRIO: Franz Schick, D Leoben. BEL: André Coppé kaj Serge Denöel, FD-oj Liège. FR GERM: Walter Lippmann, FD Hamburg; Dietrich Böning, D kaj FD Herbern. HISP: Antonio Sarmiento Dominguez, D Las Palmas de Gran Canaria. ISRAELO: Anat Zajdman, JD Haifa. NOV-ZEL: Johano Hamvai, FD Auckland.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en Jarlibro 1974, Unua Parto, baldaŭ aperonta.

JARLIBRO APEROS BALDAŬ

Kvankam jam dum monatoj prespreta, la Jarlibro 1974, Unua Parto, pro la paperkrizo en Nederlando estas nur nun finpresita. Ĝi nun estas bindata.

DONACI AL UEA PER ŜPARLIBRO

Nia Dumviva Membro Walter Kaukal, D-6730 Neustadt (Weinstr), FR Germanujo, skribis al nia estrarano pri financoj jenon:

"Mi legis vian artikolon "Unuguldenaj ŝparlibroj" en *Esperanto*, n-ro 817, januaro 1974. La propono de la fidela UEA-membro, loĝanta en Nederlando — donaci monsumon al UEA per ŝparlibro — estas realigebla ankaŭ en la Federacia Respubliko Germanujo (FRG), kaj certe ankaŭ en aliaj landoj. Tial mi decidis transskribi mian ŝparlibron 10.302.156 ĉe la distrikta ŝparkaso en D-6730 Neustadt (Weinstr) jam nun al la nomo de UEA. Donaci al UEA per ŝparlibro estas bona propono."

BRAZ: Cachoeira do Sul, FD. BRIT: Maldon. FR GERM: Bamberg, FD (komerco); Berlin, FD (stenografio). ISR: Tel-Aviv, JD. ITA: Cadorago, D. SOV: Krivoj Rog, JD. USONO: Portland, JD.

DONACIOJ 1974 (Gld.)

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: E. Burg 2,50. Nov-Zelando: H.W.R. Peterson 6,22. Sumo ĝisnuna 244,79. ĜENERALA KASO: Usono: C. Margoles 2,96. Sumo ĝisnuna 833,13. POR KONTAKTO: Danlando: G. Jorgensen 88,—. Sumo ĝisnuna 88,—.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nekrologoj

CARLOS DOMINGUES 1896-1974

En Rio de Janeiro forpasis la 22an de februaro prof. d-ro Carlos Domingues, unu el la plej elstaraj figuroj en la historio de la Esperanto-movado en Sud-Ameriko. Emerita profesoro pri juro, elstara tradukisto kaj vortaristo, d-ro Domingues aktivis en la Movado pli ol 60 jarojn, plenumante plej diversajn elstarajn funkciojn en la landa kaj internacia Esperantomovado: prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, ĉefredaktoro de *Brazilia Esperantisto*, ĉefdelegito de UEA, komitatano de UEA, akademiano. D-ro Domingues estis ĉefkunlaboranto de *Enciklopedio de Esperanto*, kunaŭtoris plurajn vortarojn kaj mul-

te tradukis el la portugala. Li kunlaboris ankaŭ en la antaŭ nelonge aperinta *Internacia komerca-ekonomika vortaro*.

EMILE GASSE 1881 - 1974

Esperantisto de post 1900, honora membro de UEA, s-ro Emile Gasse forpasis en Hyères (Francujo) la 29an de aprilo. Li estis la unua esperantisto en sia regiono (Normandio), partoprenis interalie ankaŭ la 1-an UK en Bulonjo, gvidis centojn da kursoj, inter kiuj ankaŭ oficialan ĉe la Komerca Supera Lernejo en Parizo, jam en 1905 verkis *Kurso tutmonda de Esperanto*, tradukis la verkon de Renan *Vivo de Jesuo*

(1907) kaj *Eŭgenino Grandet* de Balzac (1909). S-ro Gasse ĝis sia morto funkciis kiel fakdelegito de UEA.

LAJOS DÉR 1910-1974

Komitatano de UEA, estrarano de HEA kaj la hungara sekcio de IFEF, ing. Lajos Dér forpasis en Budapeŝto la 20an de marto. Li estis aparte aktiva en la fakaj fervojistaj rondoj kaj kunlaboris en la redaktado de fervojistaj terminaroj en la Internacia kaj pluraj naciaj lingvoj. Ing. Dér estis prezidanto de la Centra Fervojista Esperanto-Fakgrupo kaj unu el la fondintoj de la Fervojista Esperanto-Klubo "Julio Baghy" en Budapeŝto, kies prezidanto li estis ĝis sia morto, veninta kiel sekvo de mallonga grava malsano.

ERNEST NATALIS 1898-1974

La 28an de aprilo, en Lieĝo (Belgujo) forpasis prof. Ernest Natalis, vaste konata pedagogo, kiu lekciis en la Pedagogia Instituto de la Universitato en Lieĝo. Prof. Natalis lernis la Internacian Lingvon jam en la jaro 1909 kaj kvankam li neniam tre aktive partoprenis la Movadon, li ofte defendis Esperanton en siaj fakaj rondoj. En la lasta el la amaso de liaj verkoj pri edukaj sciencoj *Kvaron-jarcento de la pedagogia literaturo* troviĝas referaĵo pri la Esperanta literaturo. Ekde la fondiĝo li estis prezidanto de Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo.

W. JUSZKIEWICZ 1918-1974

En Gdynia (Pollando), la 18an de aprilo forpasis s-ino Wilhelmina Juskiewicz, aktiva membro de Pola Esperanto-Asocio kaj de UEA. Depost la jaro 1963 ŝi estis estraranino de la Filio de PEA en Gdynia.

E. TUDELA FLORES 1894-1974

En Valencia (Hispanujo) fine de januaro forpasis d-ro Ernesto Tudela Flores, unu el la plej elstaraj figuroj en la hispana Esperanto-movado, kiu interalie estas la aŭtoro de la plej ampleksa vortaro por hispanlingvanoj *Vocabulario Español-Esperanto*, kies dua eldono estas ankoraŭ havebla. D-ro Tudela Flores estis dum jardekoj fidela membro-subtenanto kaj membro-abonanto de UEA, je kies nomo li dum pluraj jardekoj funkciis kiel delegito en Valencia.

K. A. LAVRENTJEV 1894-1974

En la aĝo de 80 jaroj, la 29an de marto en Moskvo forpasis d-ro K.A. Lavrentjev, elstara figuro en la sovetista Movado. Li lernis la Internacian Lingvon jam en la jaro 1912 kaj interalie funkciis kiel rektoro de la Centra Esperanta Skribkurso kaj kiel sekretario pri instruado en la Moskva Internacia Esperanto-Klubo. Ĉe la funebra ceremonio parolis d-ro E.T. Salnikov, prof. D.L. Armand k.a.

E. HARANGOZO 1897-1974

Meze de februaro forpasis en Novi Sad (Jugoslavio) s-ino Elizabeta Harangozó, multjara aktivulino en la loka kaj landa Movado, dum multaj jaroj funkciinta kiel fakdelegito en sia loĝloko. Okaze de ŝia forpaso, la loka societo aranĝis apartan funebran kunvenon.



Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la aprilan numeron.

POLLANDO. Pola Radio nun dissendas tri programojn ĉiutage: de 5.00 ĝis 5.30 GMT per ondoj 200 m, 49 m, 31 m; de 15.30 ĝis 16.00 per ondoj 41 m, 31 m; de 21.30 ĝis 22.00 per ondoj 200 m, 49 m. La "Esperanto-anguletoj" en la nacilingvaj programoj estas dissendataj je la samaj horoj: — dimanĉe en la germanlingva programo per ondoj 49 m, 41 m, 31 m; — marde en la svedlingva programo per ondoj 200 m, 49 m; — dimanĉe en la danlingva programo per ondoj 49 m, 41 m. Detala programo estas sendata al ĉiuj petantoj, kiu ankaŭ ricevos informojn pri la nova konkurso, kun valoraj premioj; skribu al Pola Radio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

BRAZILLO. Pasintan oktobron estis inaŭgurita monata programo, kiu informas nacilingve pri Esperanto per la stacio Rádio Inconfidência PRK5, Caixa Postal 1027, BR-30000 Belo Horizonte, MG, Brazilo; ĝi okazas je 11.45 GMT kaj estas dissendata per ondo 50.00 m (6000 kHz). La stacio estas kaptebla en Brazilo kaj kelkaj najbaraj landoj.

ĈEĤOSLOVAKIO. La kurso estas dissendata per samaj ondoj, sed marde de 16.40 ĝis 16.55 GMT kaj ĵaŭde de 16.25 ĝis 16.40.

FRANCUJO. La kurso de la loka stacio Clermont-Ferrand estas dissendata per ondo 90.4 MHz (mod. frekv.).

SVISLANDO. De majo ĝis oktobro la jenaj ondlongoj estos uzataj: 1) ĉiuj elsendoj per 75.28 m (3985 kHz), 48.66 m (6165 kHz), 31.46 m (9535 kHz); 2) lunde kaj merkrede, ondoj direktitaj al Afriko 19.60 m (15305 kHz), 19.44 m (15430 kHz), 16.86 m (17795 kHz), 13.94 m (21520 kHz); 3) ĵaŭde kaj sabate, ondoj direktitaj al Afriko 25.60 m

(11720 kHz), 25.27 m (11870 kHz), 19.60 m (15305 kHz), 19.44 m (15430 kHz).

BRITUJO. Meze de majo ĉi-jare, la studenta radio-stacio University Radio Essex komencis elsendadi kurson de la Internacia Lingvo. Temas pri kurso, kiun preparis "Grupo Kvin", speciala agadunuo de Brita Esperanto-Asocio por penetri en la mediojn de amasa komunikado. *Jen nia mondo*, kiel la kurso nomiĝas, konsistas el 12 lecionoj, kiuj sekvas enkondukan prelegon de d-ro John C. Wells, funkcia kiel direktoro de la kurso. Krom la sonbenda materialo, kiu baldaŭ estos havebla ankaŭ en la formo de kasetoj, la kurso enhavas ankaŭ 62-paĝan ilustritan broŝuron. La tuta kursmaterialo nun estas vendata al radio-stacioj, lingvolaboratorioj kaj lernejoj kontraŭ 40,— britaj pundoj. La studenta radio-stacio en Essex elsendas ĉiusemajne po unu novan lecionon de la kurso.

HUNGARUJO. Ekde majo 1972, la unuan lundon de ĉiu monato, estas aŭdebla programero de Radio Pécs: "Esperanto-angulo", kiu en la hungara lingvo informas la aŭskultantaron pri okazintaĵoj el la Esperantomovado; ĝi aperas en la kadro de unuhora programo inter 16.30 kaj 17.30 GMT dum kvin minutoj kaj estas aŭdebla ĝenerale inter 17.15 kaj 17.30 sur ondo 344 m (872 kHz). La disaŭdigo estas kaptebla ĉefe en la suda parto de Hungarujo kaj en la norda regiono de Jugoslavio. La redaktoro, s-ro Pál Felső, volonte akceptas informojn kaj kritikojn. Adreso: Rádio Pécs, Eszperantósarok, Pf 200, H-7601 Pécs.

NE SUFIĈAS NUR SEKVI LA RADIO-PROGRAMOJN, SED DE TEMPO AL TEMPO NECESAS SKRIBI AL LA REDAKCIOJ DE LA PROGRAMOJ.

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.


Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, Greklando aŭ Jugoslavio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj. Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando.

Aĉetebla: unu serio da koloraj sonfilmoj, 16mm, reklamaj pri Esperanto. Anglalingva parolo, sed anstataŭigebla per alilingva. Marmot Films, 29 Green Lane, Tadworth, Surrey KT20 6TB, Britujo. Bv. sendi respondkuponon.

Rumanaj gejunuloj deziras korespondi kun ĉiuj landoj: Esperanto-rondo, Junulara klubo "Siculus", str. Lenin 11/B, Odorheiu Secuiesc, Rumanio.

Tutmonde korespondas s-ro Kim N. Hoang, 16 Nguyen Than Hien, Can Tho, Suda Vjetnamio.

Deziras korespondi 27-jara fraŭlo, alta 168cm, ŝtata oficisto (ateisto, socialisto, abstinanto), kun sameca fraŭlino, preta kunfandi E-familion



en Israelo. Partoprenos UKon, IJKon. Proponojn kun foto (resendota) sendu aerpoŝte: Jehoŝua Tilleman, 5 Busselstr. IL-26281 Kirjat-Hajim, Israelo.

UNIVOX-kursoj en Esperanto sur diskoj, sonbendoj 9,5 cm. aŭ kasetoj kun paralelaj tekstolibroj en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj. Petu novan informilon kun prezolisto, indiko de pagmanieroj ktp. INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 550-28, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Oficialaj vortoj. Presita listo denove aĉetebla kontraŭ 3 int.rkp. de Edward Ockey, 15 Upper Pines, Bantstead, Surrey, SM7 3PU, Anglujo. Ĉiuj vortoj el Universala Vortaro kaj Oficialaj Aldonoj alfabeto ordigitaj en 24-paĝa kajero kun ĉiuj anglalingvaj tradukoj rekomenditaj de la Akademio. Esenca konsultilo por vera esperantisto.

Studado de vivstiloj kaj urboplanado estas celo por 22-jara usona fraŭlo. Mi serĉas kontaktojn en la Okcidenta Eŭropo, Azio, Sudameriko kaj Aŭstralio.



Mi eble gastigos miajn gekonatojn: John Fleming, P.O. 2262, Chicago, Illinois 60690, Usono.

Danlando-Svedio-Germanio! Jen nova INTER-aranĝo 1974. Vizitoj en la dana urbo Aalborg kaj en la sveda Gotenburgo. Unue kvin ĉarmaj tagoj en Skandinavio. Ŝipveturoj, ekskursoj al fjordoj, valoraj prelegoj kaj Esperanto-turismo en agrabla, amikeca stilo kun praktikado de nia lingvo en gaja rondo. Due komuna ŝipveturo al Hamburgo kaj 59a (kun komfortaj hoteloj). Vi povas partopreni ambaŭ partojn de la INTER-aranĝo aŭ, se vi preferas, nur elekti unu el ili. Prezoj tre favoraj (ĉiu atingebla rabato dispone al la partoprenantoj). Petu informojn: INTER — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Se vi ne jam posedas la legindan novan libron AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO, mendu tuj vian ekzempleron ĉe via-landa libro-servo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002. Poŝta ĉek-konto: 37 89 64. Prezo: 4,50 guldenoj (por Nederlando 4,68 gld.); sendo-kostoj: 10%.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Fraŭlino BLANCHE VAZON forpasis la 28an de marto 1974 en sia okdeka jaro.

9, rue Jules-Michelet,
F-79400 Thouars, Francio.

En Tasmanio, insula ŝtato de Aŭstralio, nova esperantista klubo okazigos leter-ekspozicion en septembro. Bonvole skribu amase. Respondo garantiita. F-ino E. Warburton, Public Building, Launceston, Tasmania, Aŭstralio 7250.

Gotenburgo: Urba mapo — praktika informo. Petu tiun novan belaspektan turisman prospekton. La mapo ankaŭ indikas Placon de Esperanto en Gotenburgo. Skribu en la internacia lingvo al: Oficejo de Turismo, Parkgatan 2, S-411 38 Gotenburgo, Svedio.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Oficistino mezaĝa deziras korespondi tutmonde: s-ino Viivi Oppo, Pohja 2b-6, SU-202900 Viljandi, Estonio, Sovet-Unio.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 Kopenhavn, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Studento pri medicino deziras korespondi kun fraŭlinoj el Japanujo. Skribu al: Zoran Nedeljković, Albanska Golgota 15, YU-18000 Niš, Jugoslavio.



Filatelistoj! UEA povas liveri al vi kolekton de poŝtmarkoj de preskaŭ ĉiu ajn lando aŭ temo je du trionoj de la efektiva kataloga prezo. Minimuma mendosumo: 10 guldenoj. Sendu vian mendon, prefere kun samtempa pago, al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.



VERKO, KIUN DEVUS STUDI ĈIU AKTIVA MEMBRO:

POR PLI EFIKA INFORMADO

artikolserio de Ivo Lapenna unue publikigita en la revuo *Esperanto*, eldonita de la Informa Fakto de UEA kiel 20-paĝa bele ilustrita broŝuro plenŝtopita per praktikaj konsiloj ĉerpitaj el la multjaraj spertoj de la aŭtoro sur la kampo de informado.

Prezo: 2,25 (por Nederlando 2,34) guldenoj, plus sendokostoj 10%.
Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando. Rabato por kvantaj mendoj.

HELPON!

Jam de multaj jaroj, s-ro Peter Zacho en Kopenhago organizas la kolektadon kaj disvendon de uzitaj poŝtmarkoj por UEA. Rezulto: pluraj miloj da guldenoj jare subtenis la agadon de la Asocio. Ni alvokas ĉiujn, kiuj kolektas poŝtmarkojn por UEA, kunporti ilin al Hamburgo (aŭ sendi pere de bonvola kongresano) kaj tie transdoni ilin en la giĉeton de UEA.

Helpu kreskigi nian financon bazon!

Bergama Esperanto-Grupo, sub la lerta gvidado de sinjoro Cav. Federico Gialanzé, honorigas anonci, ke la 47a tutmonda SAT-kongreso okazos en la urbo **BERGAMO**.

La kongreso estos plene favorata de la publikaj Instancoj kaj Aŭtoritatoj, kaj ĝi profiliĝas interesa el ĉiuj vidpunktoj.

Bergamo, kiu prave povas nomiĝi la "perlo de la Orobaj Alpoj", honoras la naskiĝon de Papo Johano la XXIII-a, kiu estis la simbolo de Unueco kaj Frateco inter la Popoloj. La urbo estas vera trezorujo de artaj valoraĵoj, meze de ĉarmaj naturaj belaĵoj. Pro tio ni deziras, ke multnombraj estu la partoprenontoj al nia aranĝo, unika, laŭ kelkaj aspektoj, en la historio de la SAT-kongresoj.

LA LIBRO KIUN DEVAS TRALEGI ĈIUJ ESPERANTISTOJ

Legu "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto", de L. Mimó.
Prezo 17,50 guldenoj.

Anonco en esperanto

atingas pli da legantoj en pli da landoj,
ol anonco en iu ajn alia Esperanta revuo.

Tarifo:

anonco tutpaĝa = 375,— gld.
anonco duonpaĝa = 200,— gld.
anonco kvaronpaĝa = 110,— gld.
anonco okonpaĝa = 65,— gld.
anonco deksekonpaĝa = 40,— gld.
Rabato por sensanga ripeto: 20%.


Ĉu vi parolas tendare?



2a eldono
broŝurita
ilustrita
96 paĝoj
21x15cm

de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre.
Rektametoda lernolibro de TEJO por kursoj en
labortendaroj. Prezo: 2,50 (por Nederlando
2,60) gld. plus sendokostoj 10%.
Rabato por kvantaj mendoj: 1/3 ekde 3 ekz.

NENIAM PLU ZORGOJ



La moderna vivo forrodas la nervojn, malsimpligas la simplajn aferojn de la vivo, malhomigas la homon . . . Petskriboj, formularoj, limdatoj, kotizoj — kiom pli paca estus nia vivo sen tiaj burokrataĵoj! Kaj tamen necesas rekoni, ke ili donas al ni avantaĝojn. Per sia ĉiujara kotizo la individuaj membroj de UEA restas en proksima kontakto — dank' al la revuo kaj jarlibro — kun la tutmonda Esperanto-movado. Valoras la penon retrovi la tarifon, skribi pagilon, leteron, formularon, forsendi ĉion, atendi Sed vere tio ne necesas! Se vi fariĝos dumviva membro, vi ne plu bezonos ĉiujare rememori pri tiaj aferoj. Paginte en unu fojo la egalvaloron de 20-foja kotizo de Membro-Abonanto, vi neniam plu havos zorgojn pri via membreco, eĉ se vi fariĝos 100-jara. Kaj ne pensu nur pri via propra trankvileco! Faru plezuron ankaŭ al la oficistoj de UEA, kiuj neniam plu bezonos memori vin nek ĉiujare enkontigi vian pagon! Sed jen la definitiva argumento. — Se vi pagos nun la kotizon de dumviva membro (800,— guldenoj aŭ egalvaloro), vi estos por ĉiam imuna kontraŭ la doloroj de kotizaltigoj kaj rajtos fajfi pri la monda inflacio — almenaŭ iomete!

Fariĝu NUN dumviva membro de UEA!

Kontakto, JUNULARA REVUO KUN PLENKRESKA ENHAVO!

Kiu diras, ke oni pri KONTAKTO ne povas kalkuli? En majo aperis la lasta numero de 1973, sed kun enhavo, kiu estos aktuala ankaŭ en 1983! Nu, juĝu, mem, — jen la enhavo:


FATAMORGANAJ TRAJTOJ DE LA RIĈECO (La veraj riĉuloj estas la malriĉaj landoj kun grandaj rezervoj de mineraloj kaj aliaj ercoj)

KLOPODO RETROVI PROPAN IDENTECON (Zairo ne plu volas paroli france; la nova ŝtato serĉas sian propran, afrikan nacian lingvon)

INSTRUADO DE SENSENCAĴOJ (Rasa diskriminacio en lernolibroj)

ĈU ETERNA SOLVO? (Ĉu la Suno kapablas por ĉiam solvi la energikrizon?)

AL KIU APARTENAS ZAMENHOF? (5-paĝa studo de N.Z.Maimon pri la etna kaj nacia apartenoj de d-ro Zamenhof)



Abono: NUR 11 (por Nederlando 11,44) guldenoj.
Eldonas: TEJO, N. Binnenweg 176, Rotterdam 3002.